

Enhavtabelo:

3	Se... <i>Kazimierz Leja</i>
4	Varsovia Ribelo 1944 <i>Stanisław Śmigieński</i>
5	Forpasis Grandformata Homo Marian Kostecki
7	Intervjuo kun la Prezidanto de UEA d-ro Renato Corsetti <i>Kazimierz Leja</i>
9	Universala lingvo Paraglot (1942–1944) de Tadeusz Ficowski <i>Alicja Sakaguchi</i>
13	Stanisław Lem — Surloka esploro (specimeno de la traduko) <i>Jurij Finkiel</i>
16	Taglibro de nenifaranto (fragmentoj) <i>Nicola Ruggiero</i>
18	La kulturo de Esperanto <i>Ronald J. Glossop</i>
21	Ĉu vi jam trovis edzon dum ĉi tiu somero? <i>Zofia Miłska Wrzosińska (Danuta Kowalska)</i>
22	La Paradizo <i>Esperantistoj el Pelplin kaj Malbork</i>
24	Medalo de Toleremo <i>Jadwiga Wasiuk</i>
25	La „Ŝtono de Romaoj” en „Parko de la Mondo”
26	Tio ankoraŭ ĝis nun ne okazis! <i>Halina Komar</i>
28	(Post)kongresaj kaj movadaj novaĵoj
34	La prepozicio SEN en praktika uzado <i>Czesław Baranowski</i>
36	Judaj anekdotoj kaj ŝercoj <i>Josef Shemer</i>

Kovrilpaĝe: „*Lenin en Babel-turo*” —
*tutpaĝa artikolo pri krakova medio de
esperantistoj kaj la Esperanto mem,
aperinta en Dziennik Polski dum la
krakovaj solenaĵoj de 100-jariĝo de
esperantista movado en Krakovo kaj
100-jariĝo de Pola Esperantisto.*

Pola Esperantisto
sendependa revuo de polaj
esperantistoj. Aperas 6 fojojn jare.
N-ro 4/2006 – ISSN 0032-2431
eldonkvanto (naktad): 260 ekz.

Redaktas: Tomasz Chmielik, Kazimierz LEJA
(ĉefredaktoro), Lidia Ligęza. Konstantaj
kunlaborantoj: Czesław Baranowski,
Danuta Kowalska, Teresa Nemere, Stanisław
Śmigieński.

Ĉiujn korespondaĵojn kaj kontribuojn sendu
al la Eldonejo HEJME:

TTT-paĝo: www.hejme.com.pl

Retpoŝto: hejme@hejme.com.pl

Tel.: (+48 32) 265 00 38 (nur vespere!)

**La redakcio rezervas al si rajton
mallongigi kaj korekti la tekstojn.**

Jarabono enlanda: 30,00 PLN pagenda al:
Wydawnictwo Hejme, PL 41-250 Czeladź,
str. Wąska 21, skrytka 59
mBank: 36 1140 2004 0000 3202 3141 1644

Jarabono eksterlanda: 12,00 EUR pagenda
al: UEA-konto: <kazl-s> aŭ FEL-konto:
<leja-t>. Por aerpoŝta sendado aldonu 6
EUR. Nrepre informu eldonejon pri via pago!

Se...

Se... fariĝis plej ofte uzata vorto dum lastaj semajnoj. Laŭ mia opinio, tiu ĉi vorto rilatas al necerteco de parolantoj pri estontaj aferoj, pri sukceso aŭ atingebleco de planataj entreprenoj. Tamen, ĝi povas signifi male, ion pozitivan, kondiĉe ke partneroj, cirkonstancoj aŭ iu *supera forto* estos favoraj al niaj planoj.

La vorton 'se' mi aŭdis multfoje en Florenco, Krakovo, Kudowa kaj en multaj telefonaj interparoloj kun esperantistoj. Ni interparolis pri okazinta Universala Kongreso kaj tiu espereble okazonta en Pollando, pri ŝancoj unuigi polan Esperanto-movadon, pri eduka kaj kleriga (ne)agado, pri engaĝiĝo de konataj, valoraj esperantistoj, starantaj de jaroj apud la movado.

De iu malnova kolego en Krakovo mi aŭdis: „Mi venas unufoje jare al iu E-aranĝo por konvinkiĝi, ĉu io nova okazas. Tio, kion mi vidas, ne instigas min reveni pli frue ol post almenaŭ unu jaro, **se** nenio ŝanĝiĝos...”

De kelkaj aliaj, aktivaj movadanoj: „**Se** sinjoro X denove subskribos per sia nomo niajn proprajn atingojn, ne ligitajn kun li, ni demisios, foriros de la organizo...”

Aŭdeblis ankaŭ la frazo: „**Se** ĉio iros glate, post du-tri jaroj ni havos denove fortan Esperanto-movadon en Pollando, okupiĝantan pri siste-

ma instruado, edukado, profesia formado, eldonado de lerniloj kaj vortaroj. **Se...**”.

Certe por ĉiuj, kiuj kredas, ke tio ĉi entute eblas, la lasta 'se' signifas: „Mi mem devas ekaktiviĝi, forgesi ofendojn, streĉi siajn fortojn, uzi siajn kapablojn...”. **Se** tio ne okazos, ni — polaj esperantistoj — vane revas pri la rekono de Esperanto en pli granda skalo, ol nune. Do, ni faru komune tiun pozitivan 'se' ebla, necesa, plenumebla, tuja.

Inter multaj tekstoj aperintaj en ĉi kajero de PE vi trovos i.a. saĝajn (tute ne „menditajn”) vortojn de la Prezidanto de UEA, la ekzemplon de bona laboro en la silueto de ĵus forpasinta Kolego **Marian Kostecki** kaj kelkajn pruvojn de la sukcesa agado de esperantistoj en- kaj eksterlande. Kiel ĉiam, literaturaj eroj (inter ili debutoj!), la sekvan felietonon en la ciklo „Ĉu Esperanto havas kulturon?” de **Ronald J. Glossop**, kaj tre interesan prilaboron pri nekonata al pli vasta publiko universala lingvo, naskiĝinta en Pollando, „Paraglot” de **Alicja Sakaguchi**.

Post kelkaj semajnoj multaj el ni renkontiĝos en Poznań dum ARKONES (29-08-1.10). Ni uzu tiun lokon kaj favoran tempon por serioze kaj diskuti kaj agi por celoj, speguliĝantaj en tiu ĉi kaj la antaŭaj kajeroj de *Pola Esperantisto*. Eldonejo HEJME invitas ankaŭ al sia retpaĝo por mendi librojn, apogante tiamaniere pluan eldonadon i.a. de ĝis nun deficitata *Pola Esperantisto*. Ĝis la!



Varsovia Ribelo 1944

Nunjare pasas la 62a datreveno de la Varsovia Ribelo de la jaro 1944, kiu estis la heroeca, unika en la iamaj cirkonstancoj de Eŭropo, tragika, 63-taga (aŭgusto-oktobro) batalo, celinta liberigon de Varsovio — la ĉefurbo de Pollando — de la nazi-germana okupado.

Ĉi estis elvokita fare de Landa Armeo (Armia Krajowa, AK) — la pola organizo de rezisto kontraŭ la nazi-germanaj okupantoj de Pollando.

Dum la sama tempo, armeaj fortoj de liganoj — Usono, Francio kaj Britio batalis kontraŭ la rezisto de hitle-ranoj en Normandio, kaj Ruĝa Armeo de Sovetio staris jam apud Vistulo-rivero ĉe Varsovio.

Varsovio povis estiĝi la unua liberigita eŭropa ĉefurbo, tamen diversaj politikaj kalkuloj kaj ankaŭ ĝenerala politika ludado, gvidita fare de Josif Stalin, Winston Churchill kaj Franclin D. Roosevelt pretigis por ĝi la alian sorton. Ribelintoj, nombrantaj ĉirkaŭ 50 mil da soldatoj de AK, en tiu nombro 4 mil da virinoj, disponigis armilaron nur por 2500 batalantoj. Ili batalis kun la fortega germana garnizono kun 55 mil da soldatoj, havinta tankojn, aviadilojn kaj artilerion. Malgraŭ tio la polaj ribelantoj batalis por sia ĉefurbo dum 63 tagoj.

Varsovio ĵetita al volo de la sorto, pagis la altan prezon. 16–18 mil da ribelintoj estis mortigitaj kaj ĉirkaŭ 26 mil vunditaj. Ĉirkaŭ 150 mil da civita-

noj mortis dum bataloj aŭ estis mortigitaj fare de germanaj soldatoj.

Varsovio estis preskaŭ en 100% nenigiita. La civitana loĝantaro estis devigita forkuri el la sia urbo. Ĉirkaŭ 50 mil da loĝantoj falis al nazi-germanaj koncentrejoj kiel „malsekura elemento” kaj aliaj 150 mil estis transportitaj al devigaj laboroj en tiaman Germanion.

Pli multe pri Varsovia Ribelo 1944 vi povas legi kaj vidi multajn fotojn pri tiu evento en la retejo de la Asocio por Memorigo de Varsovia Ribelo 1944 (SPPW 1944) en la lingvoj: angla, ĉeĥa, franca, germana, hispana, itala, pola kaj rusa (www.sppw1944.org).

Stanisław Śmigielski
Membro de SPPW1944 (N-ro 102)



Marian Kostecki

Marian KOSTECKI — naskiĝinta la 10-an de majo 1922 en urbo Zwoleń, vojevodio de Radom, mortis en Krakovo la 12-an de aŭgusto 2006. Filo de **Józef Kostecki** — poŝtovicisto en Krakovo kaj de **Irena Deisenberg-Kostecka** — instruistino en la distrikto de Koźienice.

Laŭ profesio — longjara ŝtata oficisto, loĝanta konstante en Krakovo depost 1936; emeritiĝis en 1991. Esperantistiĝis en 1957 post kursoj en 1956–57 ĉe prof. **Mieczysław Sygnarski** en Krakovo.

Aliĝis al Krakova Filio de AEP (Asocio de Esperantistoj en Pollando) poste PEA (Pola Esperanto-Asocio), kie Li plenumis diversajn taskojn. Estis preleginto pri la popola arto en Bulgario, Hungario, Ĉeĥio kaj Pollando, surbaze de la propre aranĝitaj individuaj vojaĝoj eksterlanden (en konsultaj rilatoj kun Etnografia Muzeo en Krakovo — prof. d-ro **Władysław Bogatyński**).

Septembre 1958 Li partoprenis — la unuan fojon en sia vivo — la XV Tutpollandan Esperanto-Kongreson (kongresa n-ro 242), kiu okazis en Krakovo. La sekvan jaron — 1959, Li partoprenis ankaŭ la unuan fojon en la 44-a Universala Kongreso de Esperanto en Varsovio (krom kelkaj aliaj



UK pli poste) kaj dum la Postkongreso okazinta en Krakovo Li fariĝis turisma gvidanto por alvenintaj kongresanoj, gvidante ilin tra: Krakovo, Wieliczka, Ojcow-Skała, Oświęcim, Zakopane kaj Pieniny-montaro.

Dum la jaroj: 1961–63 **Marian Kostecki** estis viceprezidanto de la Sudregiona Estraro de PEA kaj sekve — dum la jaroj 1963–71 Li plenumis la funkcion de la prezidanto de Suda Regiono de PEA kaj samtempe Li fariĝis membro de la Ĉefa Estraro de PEA en Varsovio dum la jaroj 1966–68, kaj kiel viceprezidanto de la ĉefa Estraro dum la jaroj 1968–71, funkciante tiam en Krakovo kaj Varsovio.

En la krakova esperantista medio Li famiĝis kiel fervora esperantisto kaj sperta organizanto, aŭtoro de pli ol dudek diversaj artikoloj pri la Esperanto-movado kaj soci-kultura problemaro („Pola Esperantisto”, „Esperanto”, „Nuntempa Bulgario”, „Informaj Bultenoj” de Krakova Filio de PEA kaj de Filatela Asocio en Krakovo; ankaŭ Li estas la aŭtoro de pli ol sesdek diversaj prelegoj pri la historio de la sud-pollanda esperanti-

sta movado kaj en Krakovo, pri jubileaj datrevenoj, prezentado de la plej eminentaj kaj meritplenaj por nia movado esperantistoj–sciencistoj, kuracistoj kaj intelektuloj, ankaŭ pri filatelo. Li faris kvin intervjuojn por Pola Radio (1962,1968,1970,1989,1992).

Semideano **Marian Kostecki** rekonstruis la asociajn kronikojn pri la krakova esperantista movado (de 1906 ĝis nun); fariĝis longjara protektanto al la fama Koruso ORION en Krakovo (1957–70). Sekve Li fondis la Esperanto–Filatelan Interesiĝ–Klubon ĉe la Regiona Estraro de Pola Filatela Asocio, kiun Li prezidis dum la jaroj 1969–75; redaktis Esperanto–Filatelan Informan Bultenon (en Esperanta kaj pola lingvoj) kiel monatan periodaĵon; iniciatis la eldonadon en Krakovo de ĉiuj Esperantaj poŝtstampoj porokazaj dum la jaroj 1970–75; aranĝis Esperanto–filatelajn lokajn ekspoziciojn en Krakova Filio de PEA (1967), en la Krakova Minist–Fand–Industria Akademio (AGH,1969), en Krakova Filio de PEA (1970), en Kulturdomo en Oświęcim (1975); prilaboris grandan, filatelan kolekton pri Esperanto, kiu enhavas pli ol 480 albumkartojn kaj ampleksas ĉirkaŭ 70 procentojn de diversaj, Esperantaj filatelaĵoj en la skalo tutmonda; gvidis ankaŭ Esperanto–kursojn ĉe la Krakova Urba Konsilantaro (1964–65), ĉe la Koruso ORION (1966–68), ĉe Krakova Filio de PEA (1966 — en Żegocina somera kurso kaj en 1986–90).

En 1970 **Marian Kostecki** estis elektita kiel viceprezidanto de nov–fon-

dita en Krakovo „Konsilantaro de Kulturaj Societoj”, funkcianta sub la senpera protektado de Kultura Fakto de la Urba Konsilantaro en Krakovo. Kadre de tiu ĉi organizaĵo **Marian Kostecki** prezidis al tiel nomata „Amikeca Grupo”, ampleksanta 36–naciecajn kulturajn societojn funkciantaj en Krakovo, kune kun lokaj Esperantaj organizaĵoj.

La 21an de februaro 1984 Li fondis la Krakovan Klubon de Veteranoj kaj Senioroj (de PEA) ĉe la Vojevodia Estraro de PEA — interkonsente kun la Ĉefa Estraro de PEA — kaj al tiu ĉi Klubo Li prezidas ĝis nun senĉese.

Pro sia multjara profesia laboro kaj ankaŭ poresperanta volontula laboro, **Marian Kostecki** estis distingita per „Kavalira Kruco de la Ordeno Polonia Restituta”, „Arĝenta Kruco pro Meritoj”, kaj multaj aliaj, interalie per „Ora Honora Insigno de la Urbo Krakovo”, „Ora Honora Insigno de PEA — Meritoplana Esperantisto”, „Ora Honora Insigno de Pola Ruĝa Kruco”, k.a.

Krom ĉiuj–ĉi meritoj kaj distingoj, **Marian Kostecki** estis tre ŝatata kaj estimata Kolego, je kies helpo kaj bona humuro oni povis ĉiam kalkuli. Dum kelkaj lastaj interparoloj Li esprimadis sian nekontenton pri la stato de nuna Esperanto–movado en Pollando (perditaj aŭ nealireblaj arkivoj, manko de vera unueco kaj kunlaboro, k.m.a.). Ĉiam subtente diversajn novajn iniciatojn, Li substrekadis la du devojn de la E–komunumo: instrui kaj propagandi. Kun siaj idealoj por ĉiam Li restos en niaj koroj. ✨

d-ro Renato Corsetti

tuj post la UK en Florenco



Kion vi opinias pri la ĵus finiĝinta UK en Florenco?

RC: Oni diras ke naciaj kliŝoj ne estas veraj, sed tamen ili estis. Laŭ la itala improvizemo, ĉio estis mirakle aranĝita surloke lastmomente, kaj ĉio funkciis. Ne temas pri ŝerco. La japana LKK jam nun, unu jaron anticipe, konas la titolojn de la muzikaj pecoj ludotaj dum la muzikaj paŭzoj (interludoj, diras la konantoj de muziko). En mia folieto kun informoj praktikaj por anonci dum la inaŭguro en Florenco unu el la titoloj estis forstrekita lastmomente kaj anstataŭgita per alia.

La kongreso estis sukcesa el pluraj vidpunktoj, sed ĉefe el la vidpunkto de la kontento de la partoprenintoj. Tre bona gazetara reeĥo en la lando. Tre bona impresado de la urbaj instancoj en Florenco, kiuj volas kunlabori kun la loka Esperanto-grupo. Tre riĉa kultura programo kun tunoj da prelegoj pri ĉio ebla. Pri la turisma flanko ne zorgis ni sed la urbo mem, kiu estas liber-aera muzeo.

Ĉu la pola propono por okazigi UK '2009 en Pollando (Bjalistoko aŭ alia loko) estas laŭ vi interesa kaj plenumbla?

RC: Jes. La propono estas interesa kaj plenumbla. Pollando kaj ĝiaj urboj (ĉefe Bjalistoko, kompreneble) estas parto de la esperantista kultura heredaĵo. Kiu ne povas citi tion, kio okazis en la bazaro de Bjalistoko, tra kiu vagis la juna Ludoviko? Kiu ne scias pri Pola Radio, pri la naskiĝlando de Espernato, ktp.?

Cetere la nuna Pollando kuŝas en tre bona geografia pozicio meze inter la okcidenta Eŭropo, la orienta, la norda kaj la suda Eŭropoj. Verŝajne povus ripetiĝi la granda alfluo, kiu okazis en Vilno, Litovujo.

El mia vidpunkto de maljuna movadisto, tiu UK povus esti la okazo por la pola tutlanda movado retrovi sin mem, kaj reakiri la iaman unuecon. El la movada vidpunkto validas, laŭ mi la diro: „oni fartis pli bone, kiam oni fartis pli malbone”.

Kion vi, distance de Rotterdamo, opinias plibonigebla en la pola E-movado, ankaŭ rilate al eventuala UK?

RC: Mi kredas, ke multo plibonigeblas, se poloj ekmarŝos la vojon senkompatan de la usona organizmodelo (rigardu McDonald's), kiu —

ĉu surprize? — estas precize la sama de tiu de la eklezia organiziĝo, kaj de la komunisma centr-komitata modelo.

Alivorte oni devas sin demandi, kiu estas la ekzistocelo de la pola Espernato-movado. Laŭ mi, ĝia ekzistocelo estas la disvastigo de Esperanto en Pollando. Ĉio cetera, mi diru tion sincere, estas duarangaj celoj: disvastigi la polan kulturon en la mondo, esprimi sian poetan kapablon en Esperanto, krei kulturan trezoron, ktp. estas belaj aferoj, sed nur se ekzistas esperantistoj, kaj iu devas krei tiujn esperantistojn.

Se la ekzistocelo estas tiu, la sekvo estas, ke ĉio, kio utilas al tiu celo estas utila, ĉio cetera ne rajtas malhelpi tiun celon. Alivorte oni devus havi fortan landan asocion, kiu gvidus siajn lokajn grupojn pri la disvastigado de Esperanto per ideoj, konsiloj, materialoj.

Kiel oni financus tian landan asocion? La belaj tempoj de la ŝtata financado estas for, bedaŭrinde rilate al Esperanto sed ankaŭ bonŝance. Bonŝance, ĉar polaj esperantistoj havas la ŝancon lerni, kiel daŭre funkcii dum la pasinta jarcento esperantistaj organizaĵoj en okcidentaj landoj. La esperantistoj mem pagas kaj ili mem elektas la gvidorganojn. Kiam la gvidorganoj estas elektitaj, ĉiuj havas la moralan devon kunlabori ĝis la venontaj elektoj, kiam oni povos voĉdoni por aliaj.

Neniu individuismo estas utila por la celo, pri kiu ni parolis antaŭe. Neniu kapablas triumfigi Esperan-

ton tutsola. Ni refariĝu modestaj kaj ŝatantaj la aliajn esperantistojn kaj kunlaborantaj kun ili.

Diskutoj pri la pasinteco ofte kaŝas la malvolonton alfronti la nuntempo, kiu estas tre malfacila. Kiu volas kompreni, bonvolu kompreni.

De kio, laŭ via opinio, dependas manko de signifaj polaj akcentoj internaciskale?

RC: Kiel mi diris antaŭe, mi ne kredas je la geniaj individuoj, kiuj sole kreas la historion. Ne Hitler faris ĉion. Ne Bush faras ĉion mem. Ili estas nur la reprezentantoj de almenaŭ partoj de socioj kun iliaj samaj ideoj.

Se, kiel mi diris antaŭe, ne ekzistas forta Pola Esperanto-Asocio, se ne ekzistas forta movado por Esperanto en Pollando, se polaj esperantistoj ne kunlaboras inter si, kiel povas ekzisti pola signifo internacie? Certe en Pollando estas tre valoraj individuoj esperantlingvaj, kiuj daŭre produktas kulturaĵojn, sed mankas asocio, kiu valorigu ilin, kiu aranĝu ĝuste kongresojn, ankaŭ se ne universalajn, kie estas ebleco prezenti ilin al vasta publiko. Mi scias pri la unuopaj gloraj iniciatoj en Poznań, en Bjalistoko aŭ en Lublino. Ili estas tre bonaj aferoj, sed mankas resumanto kaj reprezentanto. Tio espereble ekestos okaze de la Universala Kongreso.

Koran dankon por la intervjuo!

Interparolis:

**dro Renato Corsetti
kaj Kazimierz Leja**



Alicja Sakaguchi

Universala lingvo Paraglot (1942–1944) de Tadeusz Ficowski

Malpli popularan, nekonvencian alternativon solvi la lingvan problemon en la mondo prezentas polo **Tadeusz Ficowski**. Temas pri projekto de ĝenerala aposteriora lingvo „Paraglot”, naskiĝinta rezulte de la kritiko de Esperanto. Kernon de tiu laboraĵo konstituas zorge ellaborita gramatika sistemo de la nova lingvo, lecionoj kun teksto por lerni, kaj vortaroj: Paraglot–pola kaj pola–Paraglot. La vortaro enhavas proksimume 6700 kapvortojn en la parto Paraglot–pola kaj 8300 en la parto pola–Paraglot. La vortaro ampleksas ĉefe ĝeneralan leksikon. Ĝi malhavas frazeologiajn parolturnojn. La vortaro konsideras ankaŭ certan kvanton da teknikaj kaj fakaj esprimoj el la kampoj de matematiko, fiziko, botaniko, zoologio, medicino, juro, komerco kaj kelkaj aliaj fakoj. La tekstojn (ĉapitro III) konstituas poezio de **Jan Kasprowicz**, **Aleksandr Puszkın**, **Oskar Wild**, **Paul Verlaine** kaj aliaj aŭtoroj, kiujn tradukis al Paraglot **Czesław Jastrzębiec–Kozłowski**. Prozon de **Rudyard Kipling** tradukis al Paraglot aŭtoro de la verko **Tadeusz Ficowski**.

La tajpita manuskripto ekestis en la jaroj 1942–1944 en Varsovio. Ĝi enhavas pli ol 250 paĝojn. La ĉi–prezentata projekto de la aposteriora lingvo apartenas al la ĝis nun nekonataj ver-

koj de **Tadeusz Ficowski**. Pri ĝia ekzisto oni povis ĝis nun informiĝi nur surbaze de mencio en la artikolo de **Zofia Banet–Fornalowa** „Homo landlima kun stele verda radiko...”, en kiu estas prezentitaj **Jerzy** kaj **Tadeusz Ficowski**. Ĉi tiu artikolo aperis en la jaro 2000 en „Literatura Foiro” (La Chaux–de–Fonds). Krome menciindas, ke post finiĝo de la milito **Tadeusz Ficowski** ne entreprenis klopodojn publike informi pri la ekzisto de lia interlingvistika verko. Tiel Paraglot estas komunike nerealiĝinta lingvoprojekto kaj kontinuo de plurjarcentaj klopodoj krei universalan lingvon. Ĝis nun ekzistas kelkcent da tiaj lingvoj. Krom Esperanto kaj Paraglot ekzistas ankoraŭ aliaj internaciaj planlingvoj estiĝintaj en Pollando. La indekso de internaciaj planlingvoj de **Aleksandr Duliĉenko** (1990) montras, ke en Pollando konstruiĝis pli ol dek lingvoj.

Jerzy Ficowski, filo de la aŭtoro de Paraglot, transdonis al mi en la jaro 2001 savitan dum la milito 250–paĝan manuskripton de lia patro en la intenco eldoni tiun materialon. Lia serĉado trovi eldonanton de ĉi tiu verko daŭris pli ol tridek jarojn. Ĉefa kaŭzo de longjaraj malfacilaĵoj publikigi ĝin fontas en ĝenerala manko de specialistoj el la sfero de interlingvi-

stiko. Tiun mizeron klarigas manko de universitatnivelaĵoj edukantaj tiajn fakulojn. Eldonon de ĉi tiu verko akompanas enkonduko de la eldoninto (en la pola kaj Esperanto), piednotoj kaj komentoj.

Tadeusz Ficowski naskiĝis la 14an de januaro 1893 en Gorczaków (hodiaŭ Ukrainio), mortis en Włochy apud Varsovio la 7an de aprilo 1958. En Kievo li finis klasikan gimnazion kaj poste Juran Fakultaton en la Kieva Universitato. En 1915 li estis en Kievo redaktoro de la pola literatura ĵurnalo „Pióro”. Post la revolucio en Ruslando li alvenis al Varsovio, kie en la jaro 1920 li aliĝis kiel volontulo al fronto en la milito kontraŭ la Soveta Unio. Dum la jaroj inter la militoj li laboris en Varsovio en la Ministerio de Publikaj Laboroj kaj sekve en la Registara Komisarejo, post la dua mondmilito — en la Ministerio de Rekonstruo. **Tadeusz Ficowski** estas la patro de **Jerzy Ficowski** (1924–2006), konata pola poeto, eseisto, esploranto de la kulturo kaj folkloro de polaj ciganoj kaj ankaŭ de literatura kreado de **Bruno Schulz**. Simile kiel lia filo, **Tadeusz Ficowski** agis ankaŭ kiel literaturisto. Li verkis eseojn kaj beletrajn tekstojn. Parton el ili li publikigis en siaj lastaj vivjaroj sub la pseŭdonimo **Adam Sas** en la semajna emigracia revuo „Wiadomości” (Informoj) eldonata en Londono. Liajn eseojn kaj beletrajn tekstojn el la 40aj jaroj, kun la enkonduko de **Leszek Kołakowski**, eldonis lia filo **Jerzy Ficowski** en la volumo titolita „Wielka Ameba oraz inne eseje, szkice

ce i fragmenty” (Granda Amebo kaj aliaj eseoj, skizoj kaj fragmentoj).

Ekde sia frua junaĝo **Tadeusz Ficowski** aktive interesiĝis pri Esperanto. Li Esperantigis dramon de **Stanisław Przybyszewski** „La neĝo” (originalo: „Śnieg” 1903), kiun 1912 eldonis en Varsovio **Jan Günther**, la iama redaktoro de la ĵurnalo „Pola Esperantisto”. Dum la okupacio de Hitler, en kondiĉoj de severa malriĉeco li komencis, daŭrigis kaj finis laborojn por krei novan internacian aposterioran lingvon, kiun li nomis „Paraglot – Język Powszechny” (Paraglot — Ĝenerala Lingvo). Aŭtoro de ĉi tiu lingvo estas nek profesia lingvisto, nek filologo, sed juristo kun ĝenerala humanisme–klasika edukado. Tiel Paraglot estas lingvo-projekto de amatoro kaj memlernanto — tamen kun rimarkinda kapablo de kritika, sobra enigardo en funkciadon de la lingvo kaj kun poliglota intuicio. Pensoj esprimitaj en ĉi tiu laboraĵo atestas lian neordinaran personecon kaj individuecon samkiel sentemon kontraŭ sociaj kaj komunikaj problemoj en la moderna mondo. Traleginte unuajn ĉapitrojn de la verko rimarkeblas certa defecito de la aŭtoro koncerne lian regadon de la lingvistika, priskriba kaj teoria metiejaj. Tiun mankon kompensas tamen bilda prezento de liaj pensoj, kiujn li konstante ilustras per multnombraj ekzemploj. Tipa estas ĉikaze ankaŭ lia apliko de la „lerneja” nomenklaturro (kun karakteriza por la koncerna stilo uzado de la pollingvaj esprimoj, kiel ekz. „odmiennia” anstataŭ „flek-

sja/deklinacַa”, „narostki” anstataŭ „formanty słowotwórcze”, „wyrzutnia” anstataŭ „elizja”, „omówienia” anstataŭ „peryfrazy”, aŭ „zlepki słowne” anstataŭ „kompozycje leksykalne”. Paraglot ne estas ankaŭ rezulto de fundaj komparaj esploroj de unuopaj lingvoj. Tiel kriteriojn por konstrui novan lingvon la aŭtoro apogas sur la pripensoj baziĝantaj sur la konataj de li lingvoj, ĉefe la pola kaj la latina.

La leksika materialo kune kun iliaj signifoj estas ĉefe transprenita el la klasika latina, parte ankaŭ el la novtempaj latinidaj lingvoj kaj el Esperanto. El proksimume 6700 vortoj proponitaj de **Ficowski**, probable 85–95% estas latin–devenaj. Inter ili aperas tri specoj de vortelementoj: (1) Leksemoj kun alta grado de „internacieco”, ekz. humano ‘homo’ (lat. humanus); (2) Leksemoj neplene „internaciaj”, sed konataj al plimulto de eŭropaj lingvoj, ekz. menso ‘monato’ (lat. mensis); (3) Leksemoj kun malpligranda aŭ nenia disvastiĝo en eŭropaj lingvoj (speciale en la ĝenerala, ĉiutaga lingvo), ekz. morbo ‘malsano’ (lat. morbus).

Vidpunkte al la demando de vortetimologio, eblas konstati, ke Paraglot altgrade similas al la latinidaj lingvoj. Krom radikoj devenantaj el tiu lingvogrupo, ĝi enhavas etan parton da leksikaj elementoj ne ĉerpitaj el la naturaj lingvoj kun aprioraj ecoj, ekz. tota ‘tiom da’, nulali ‘neniamaniere’.

Konsiderante la bazan leksikon de Paraglot okulfrapas rimarkinda nombro da vortoj nomataj „falsaj

amikoj”, tio estas „danĝeraj” vortoj, kiuj en diversaj lingvoj havas similan aŭ eĉ identan son-/grafikan formon, sed diferencas laŭ la signifo, ekz. calda ‘varma’ (it. caldo — sed: germ. kalt, ang. cold ‘malvarma’), lauta ‘ordigema’, ‘pura’ (lat. lautus — sed: germ. laut ‘laŭta, brua’, Esp. laŭta).

Tadeusz Ficowski rimarkigas en la enkonduko al sia verko, ke la ĝenerala lingvo Paraglot estas nur reformita Esperanto. Eldonistino de la jena laboraĵo tamen opinias, ke vidpunkte al la leksiko kaj al la gramatiko, Paraglot tiomgrade diferencas de la strukturo de Esperanto, ke temas pri tute malsama modelo de internacia lingvo. Konsiderante la konstrumetodon Paraglot reprezentas miksan, nome: skemism–naturalisman lingvotipon. Kontraŭe al tio Esperanto apartenas al skemisma tipo. Ambaŭ konstrumetodoj, la skemisma kaj la naturalisma, rilatas (1) al kreado de la leksiko, (2) al gramatiko kaj (3) al ortografio de la nova lingvo.

Aparta specifaĵo de Paraglot estas „simpligo” de gramatikaj formoj per aplikado de sintezaj konstruoj. Tia procedo (kiu ĉiuokaze ne estas deviga) ebligas mallongigon de pli longaj, analizaj formoj. Tiel ekz. oni povas ellasi vokalon en personaj pronomoj me, tu kaj en la negacia vorto no antaŭ verboj, kaj ankaŭ en la prepozicio di antaŭ ĉiuj vortoj komenciĝantaj per vokalo, ekz.: m’ agnosć ‘mi agnoskas’, t’ ignor ‘vi ne scias’, n’ obstinam! ‘ne obstinu!’. Kunfandiĝo de prepozicioj kaj pronomoj finiĝantaj per vokalo kun la

sekvanta ilin (difinita) artikolo el en unu vorton estas plua formo de elizio (= sonelfetado) (de el = del, di el = dil, que el = quel). El inter verbaj finaĵoj elizio rilatas nur al la prezenca markilo -em, ekz. me quezem aŭ me quez 'mi petas'. Tio koncernas ankaŭ la verbon stem kun senvokala radikost-, ekz.: me-st el arĥo 'mi estas ĉefo', no-st calmo in cor mea 'ne estas trankvilo en mia koro'. Anstataŭ analiza formo, kiel ekz. ta principios stem laudenda 'tiuj principoj estas laŭdendaj', oni povas uzi la sintezan ta principios laudendem. Utiligante leĝon de elizio, estas necese sekvi en la skriba lingvo regulojn pri la uzado de apostrofo. Cetere, rimarkinda estas fakto, ke simpliĝoj helpe de sintezaj, tio signifas mallongaj, formoj, apartenas al la plej tipaj evolufenomenoj de la moderna Esperanto. Ili ne estas tamen tiomgrade radikalaj kiel tiuj proponitaj por Paraglot. En Esperanto observeblas simpliĝo de analizaj formoj, kiel ekz.: apud mi estus leginta disvastiĝas ankaŭ mi legintus, apud fari piednoton — piednoti.

Unu el la postuloj konstrui internaciajn planlingvojn rekomendas ankaŭ eviton de konsonant- kaj vokalamasiĝoj. Paraglot (kiel ankaŭ Esperanto) enhavas tamen certan nombron da vortoj kun tiaspecaj vicoj, ekz. altrorzi 'ien', decstrofa 'dekversa', eiule 'plendi', triies 'trifoje', genuiolo 'genuetoj', alquumi 'iam'.

Se temas pri fonetiko kaj fonologio, oni povas krome rimarki, ke en Paraglot akcento ludas rolon ĉe la distingado de signifoj, ekz. he-

ros (sen apostrofo) havas akcenton sur la unua silabo kaj signifas 'dommastroj', dum heros' (kun apostrofo) kun la akcento sur la dua silabo signifas 'herooj'; castas' signifas 'kastoj', sed castas 'ĉasta'. Aplikado de akcento por distingado de signifoj devus esti ankaŭ evitata en internaciaj planlingvoj.

Resumante mi ŝatas konstati, ke **Tadeusz Ficowski** postsekvas la principojn, kiuj estas konformaj al aposteriora tipo. Tiaspecaj lingvoj strebas esti facile lerneblaj kaj laŭeble mondvaste uzeblaj. Ili celas unuflanke regulecon kaj simplecon, sed aliflanke konsideras la historie evoluintajn ortografiajn, fonologiajn, morfologiajn, leksikajn kaj sintaksajn fenomenojn. Respondo al la demando, kiomgrade **Tadeusz Ficowski** sukcesis igi la leksikon, gramatikon kaj ortografion proksima al latinidaj lingvoj kaj tamen regula kaj travebla — rezerviĝu al pli postaj, pli profundaj esploroj. Ĉiuokaze estas certe, ke li preferis morfologiajn formojn, kiuj estas senesceptaj, senvariaj, facile segmenteblaj, travebleblaj kaj unusignifaj. Ĉio ĉi adekvatas al ĝeneralaj konstrureguloj de internaciaj planlingvoj strebantaj al laŭeble plej altgrada reguleco.

Literaturo:

Tadeusz Ficowski: „Paraglot. Język powszechny” (1942–1944). Z pism pośmiertnych wydała i zaopatrzyła w przedmowę oraz uwagi do tekstu dzieła Alicja Sakaguchi. Poznań: Wydawnictwo „Rys” 2006, 372 paĝoj.

Ŝurloka esploro

Specimeno de la traduko de Jurij Finkel
de la rusa traduko el la pola fare de K. Duŝenko

II. La Instituto de Historiaj Maŝinoj

Advokato Finkelstein konvinkis min. La venĝo estis neebla. Kvankam tio estas, certe, unu el la plej superaj ĝuoj de la vivo, kaj, kiel asertas ekspertoj, malvarma venĝo plej bongustas. Kiu el ni ne havas personajn malamikojn, pro kiuj ni detenas nin for de malutilaj pasioj, por ke en bonega sano ĝisatendi la necesan horon? Pri tio mi povus rakonti nemal multe, ja kosmonaŭtiko, kompreneble, lasas amason da tempo por meditado. Unu homo, mi ne diros lian nomon, por ne eternigi ĝin, dediĉis sin tutan al primakulado de miaj verkoj. Revenante el Kasiopeo, mi sciis, ke mi renkontos lin en la oficiala bankedo, kaj pripensadis diversajn variantojn de tiu renkonto. Certe, li venos al mi kaj donos sian manon, kaj mi, ekzemple, petu lin klarigi al mi, ĉu li estas kanajlo aŭ kreteno, ĉar al kretenoj mi premas la manon, sed al kanajloj — neniam. Sed tio estis iel tro mizere, operete. Mi malaprobadis unu varianton post alia, kaj alteriĝinte, kun teruro aŭdis, ke ĉio estis vana. Li ŝanĝis sian opinion kaj nun laŭdegadis min.

Al Küssmich mi same nenion povis fari. Tial mi decidis, ke ekde nun li ne ekzistas por mi. Kaj li vere malaperis, sed nur el mia realo. En sonĝaj koŝmaroj li donacis al mi jaĥtojn, palacojn, cisternoŝipojn, plenajn je «Milmil», kaj amasojn da brilantoj. Mi devis surgenue forrampi de hordo de advokatoj, kaj tiuj, atinginte min en malluma strateto, plenigis miajn poŝojn per arĝentaj kuleretoj. Kondamnita al tri monatoj de malfacilaj zorgoj en Svisio, mi timis, ke mi simple perdos la sanon. Nokte Küssmich, kaj tage donacaspektaj parkoj, ore brilantaj ŝildetoj kun nomoj de bankoj, borsaj bultenoj kaj kurzoj de akcioj en «Neue Zürcher Zeitung». Dum promenoj mi evitadis unu straton: oni diris al mi, ke sub asfalto, inter tuboj tie estas konservataj gardoŝrankoj kun oro; por ili, onidire, mankis loko en la subteraĵo, kaj la banko enfosiĝis sub la pavimon. Feliĉe, mi rememoris pri la invito de profesoro Kull. Tio min savis.

La instituto troviĝis eksterurbe. En ĝiaj vitraj muroj speguliĝis ĉielo kaj nuboj. Ĝi altis meze de vasta parko, rimarkebla de malproksime. Malantaŭ la barilo en formo de lancoj kun orizitaj pintoj varmiĝis sub la suno tonditaj viroj de arbustoj. El la akceptejo mi telefonis en la ĉefan konstruaĵon; poste mi traveturis pluen kaj parkis la aŭton sub grandaj kaŝtanoj apud baseno, en kiu naĝis dormemaj cignoj. Mi malŝategas tiujn stultajn estaĵojn kaj ne kom-

prenas, kial tiom da talentaj homoj (speciale artistoj) kaptiĝis je hoko de iliaj fleksitaj koloj.

La halo de la instituto estis senlima. Per io ĝi similis katedralon — eble, pro silento kaj marmoraj platoj; linteloj, spegultitaj en ili, pensigis pri preĝejoj volboj. De malproksime mi ekvidis la profesoron — li estis eliranta el lifto, ridetante responde al mia saluto. Tiel komenciĝis uverturo al unu el la plej gravaj miaj vojaĝoj; sed mi, sekvante mian kondukanton laŭ koridoroj de iu alta etaĝo, preter teĥnikistoj en blankaj ĥalatoj, rajdantaj en seloj de senbrue ruliĝantaj elektroĉaroj, ne povis pri tio scii. Malgraŭ taga tempo, brilis luminescentaj lampoj jen per varma, jen per malvarma lumo, kvazaŭ aludante, ke ĉi-tia tempo ne obeas la teran. En la grandega kabineto la profesoro prezentis al mi ĉirkaŭ dozenon da siaj kunlaborantoj — sekcioj de IHM. Por ne ĝeni mian modestecon, ili salutis min respekte, sed sen servileco. Tio estis rondeto de brilaj, unuarangaj mensoj. Bedaŭrinde, ne ĉiujn mi memoras. Mi scias, ke la Sekcion de Financa Kosmologio ne estris doktoro de Voley, la sekcioestro havis ian alian nomon, sed kiel — mi forĝesis. Ĉiuokaze, iel simile. Tamen, financoj ne estas mia fako. Alia afero estas fiziko. Tiun sekcion estris franclingva sviso, docento Bourr de Calance; preskaŭ 49 procentoj da liaj subuloj estis frenezuloj. La enviantoj — ĉar la ideo montriĝis genia — asertis, ke ankaŭ de Calance mem estas mensmalsana. Kvazaŭ sur tiaj intelektaj altaĵoj tio povus havi ian ajn sencon. Prenu por ekzemplo kelkajn lastajn ideojn de liaj kunlaborantoj. Se ne eblas movi en tempo, necesas movi la tempon. Se energio ne deziras flui inter izotermaj punktoj, necesas ĝin igi, farante truojn. El tio devenis entronoj, inversoroj kaj reversoroj, kaj ankaŭ fosistiko, aŭ profundigo de kavetoj en la strukturo de la spaco-tempo, ĝis kiam ie krevos, — kaj tiu, ekster ajna dubo, freneza ideo metis komencon de la nova erao en fiziko. Tamen, dume neniu sciis, kiel tion fari, sed praktika apliko zorgigis en la Instituto nemultajn, ĉar ĝi tuta estis strebanta en malproksiman estontecon. De Calance, ĉiuokaze, estis plenigita de entuziasmo. Certe, ajna renkontita alienulo ne povus kalkuli je posteno en lia sekcio. Necesis freneziĝi ne sur banala grundo de personaj problemoj, sed sur la plej malmolaj nuksoj de fiziko. Tamen, tiu penso apartenis jam al Niels Bohr: tiu iam rimarkis, ke en la moderna fiziko ordinaraj ideoj jam ne sufiĉas — necesas la frenezaj. La dekstra mano de de Calance estis doktoro Doberman, la maldekstra — malalta Sen-Beernares. Aŭ inverse. Ĝuste li (sed mi denove ne memoras — kiu el ili) matematike pruvis la eblon de transformiĝo de kvarkoj al akvarkoj, kaj de tiuj, siavice — al akvarioj. En nia Universo tio ne eblas, sed en aliaj, sendube, eblas; per tio la teorio eliris ekster limojn de nia Universo. Tamen mi estas preskaŭ certa, ke ĝuste la nederlandano Doberman diris al mi subite, ke la eklezio uzas malkonvenajn simbolojn, uzante pastoralajn, alivorte, paŝtistajn imagojn de ŝafidoj kaj ŝafoj, ĉar loko de ŝafidoj estas sur rostostango, kaj ŝafoj taŭgas por ŝaŝliko. De Ca-

lance, certe, havis iomajn malfacilaĵojn kun sia kolektivo. Aldone li revis akiri almenaŭ paron da freneziĝintaj Nobel-premiitoj; malfeliĉe, ĉiuj vivantaj estis dume normalaj. Liaj sciencistoj kondukis treege logike por sia stato, eble, eĉ tro logike, kaj tute ignoris ordinarajn morojn, kiam temis pri la esenco mem. Sur mia tibio ĝis nun videblas spuro de la dentoj de doktoro Druss; li mordis min tute ne en paroksismo de frenezo, sed por tio, ke mi pli bone enmemorigu lian teorion de spinoj (alivorte, turniĝoj) — ne maldekstraj kaj ne dekstraj, sed triaj. Kaj vere, li atingis la celon: mi memoras ĉion precize.

Necesas, tamen, meti almenaŭ ian ordon en tiujn turbulentajn rememorojn. La koro de la Instituto estis grandegaj historiaj maŝinoj, nomataj ankaŭ elektrokronografoj; la ceteraj sekcioj havis kun ili konstantan komunikadon. La sekcion de Ontologiaj Eraroj kaj Distordoj estris Jondler Knack, alta usonano, filo de islandanino kaj eskimo; antaŭ kreo de tiu ĉi sekcio neniu havis eĉ etan imagon pri la vera rolo de eraraj ideoj, kiuj, esence, determinas konduton de racihavaj estaĵoj. Rigardinte unuan fojon en la laboratorion de Industria Sekstiko, mi decidis, ke trafis en muzeon de malnovaj vapormaŝinoj aŭ pumpiloj de James Watt, ĉar tie ĉio kun siblego moviĝis tien-reen; sed tio estis nur metiejo de putinaj maŝinoj, primitivaj kopulatricoj; ilin oni veturigis el diversaj landoj kun celo de normigo kaj komparaj konverĝaj esploroj. La japanaj postumentoj estis lakitaj kaj ornamitaj per pentritaj floroj de blanka ĉerizo. La germanaj estis absolute funkciaj, sen ajnaj ornamaĵoj, iliaj pistoj sensone moviĝis en brilantaj pro lubriko cilindroj, kaj la fakuloj de Knack ekstrapolaciis jam sekvan generacion de kopulatricoj. Sur la muroj pendis koloraj grafikaĵoj de erekto kaj malerekto, kaj ankaŭ kurboj de orgasma kaj ekstaza saturiĝo. Ĉio ĉi estis tre interesa, sed la etoso tie regis sufiĉe malgaja, ĉar tie oni jam sciis, ke la hipotezon pri universala karaktero de tera erotiko kontestis informoj de interstelaj ekspedicioj. Doktoro Fabelhaft, la kreinto de la teorio de konstante kreskanta intervalo inter agoj de amoro kaj nasko (tiel nomata teorio de kopulacia-prokreacia diverĝo), laŭ vortoj de la kolegoj, drinkis ĝis perdo de konscio, ĉar jam kalkulis parametrojn de tiu diverĝo por ĉiuj biologiaj populacioj de la Galaksio kune kun la Magelana Nebulozo, kiam la direktoro ordonis transdoni la tutan dokumentaron en la sekcion de Eraroj kaj Distordoj. Tial mi ne sukcesis konatiĝi kun li — li evitis homojn.

Tamen la sekcio de Eksterteraj Teologioj floris. Malgraŭ mikrominiaturigo (en blokoj de hidrarga memoro kun kapacito je 107 sanktoroj por kuba milimetro estis konservataj nur la plej bazaj scioj pri teodiceoj), oni parolis pri transigo de la sekcio en apartan domon, ja la elektronika enciklopedio de konfesioj pezis jam preskaŭ 150 tunojn. Tio estis sufiĉe neordinare — stari antaŭ giganta bloko de memoro, katenita en ŝtalo, kie, kvazaŭ en brilanta sarkofago, ripozis miloj da religioj de la Kosmo. [...]

Nicola Ruggiero

Taglibro de nenifaranto (fragmentoj)

al tiuj nimfoj kiuj, en Arkadio,
kantas nur por mi, cele instruon.

...ĉe vi, en Skarabantio

Mensogas tiuj, kiuj amon pentras
kiel duoblan stelon ĉirkaŭanta
gravitocentron en komuno lanta,
kiu neniam en orbit' ekscentras!

William Auld, Duobla stelo

Alkaje #1

Ŝi estas tiel dista sed ama ke
ne povas mi paroli pri ŝi sen flam'
en koro kaj larmaokule
grekan poemon reciti ame.
Knabin' hungara, rido iĝinta Muz'
poeta, vere dolĉa kaj ĉarma in'
vi poetino de la sentoj,
ĉu vi aŭskultas ĉi kanton mian?
Mi estas sola antaŭ l' decida cel':
ja estas malfacile amadi vin
dum ĉio fluas preter vivo
kiam la luno kaŝiĝas nokte.

letero

Ho Amarilo, vi laŭ l' vero pravas
se malfermante ĉi leteron, diras
vi: „Ĉu li vivas? Mi ja ege miras
pro tio kion mane mi nun havas”.
Se vi legante ĉi soneton, lavas
makulon pekan mian kaj deziras
ankoraŭ skribi al amik' — suspiras
mi — ĝojos mia kor': „Al ŝi ja gravas”.

Sed se l' deziro skribi al amiko
malrespondema ne atingas vin
pro tiu kaj ĉi tiu ajn kialo
mi ege min bedaŭros, kaj l' kalikon
maldolĉan trinkos mi, suditalo,
kaj ploros: „Min ne volas amikin' ”.

unufoje al Skarabantio

Amika rondo, stranga familia
amsento kaj deziro vin enbraki
dum horoj, dum la temp' decidis haki
ĉion, pliproksimigas bildon vian.
La vino min distras kaj amuzas certe,
min igas nun pliparolema homo,
instigas pensi nur pri via bono,
ekceptu mian penson nur oferte.
Mi vere kordeziras vin ekkisi
sur manojn, kaj tujege supreniri
silente ĝis la vangoj kaj ekbisi
kaj poste pri okuloj viaj miri
kaj rompi per silenta homa krio
de vi la lipojn, la sekret' de Dio.

en via ĉambro

Timemaj estis ni, sed saman celon
mi volis trafi, dum en via ĉambro
mi fikse vidis la diecan belon
de vi, kaj la okulojn, ho, el ambro,
en ili mi ekkonis la ĉielon
malhelan, kiun skribis vi per jambo,
trokeo, hajko. Mi plenumis ŝtelon,
irante pliproksime nur per amblo.
Mi ŝtelis vian timon per la lipoj,
kaj iĝis mia per karesoj manaj
de ambaŭ. Kisis mi vian malĝojon,
ĉar mi decidis sekvi vian vojon,
konsoli vin ne per fatamorganaj
diraĵoj, sed per miaj am-principoj.

kio gravas?

Tute ne gravas, ke vi malproksimas,
enloĝas urbon de alia tempo,
bela kaj en aŭtun' kaj en printempo,
kaj vintre kaj somere, ke kutimas
mi sonĝi nure. Gravias, ke vi ne timas
plej etan umon; prenu nur ekzemplon
kaj mi por vi rimumos post kontemplo.
Tute ja gravas, ke vi korproksimas.
Gravas, ke, ĉe l' vekiĝo, la parfumon
de via korp' mi flaru, la feliĉon
mi havu sur vizaĝon kaj en koron.
Gravas, ke l' tago havu la koloron
de mia amatino, ŝian riĉon,
kaj, fine sed gravege, ŝian lumon.

hajkoj

Mi vin amegas
kiel la migdala arb'
dum ĉie martas...

Maltrankviliĝoj,
malĝojo kaj malcerto
sur vi forestu,
al vi nur fremdaj
estu l' tristo kaj la plor',

ripozu dolĉe
en via varmo,
malgraŭ mia malĉeest'
ridetu, amo.

Vi estas dista,
sed kiel mev' de l' maro:
mi ja revenos.

la timo

La timo kaptis vin, la tim' ne vidi
min plu, suferi ade kaj estonte
pro mia malĉeesto: „Horizonte
brilpalas vi, Lun' luma: ĉu malridi
kaj plusilenti aŭ al ŝi konfidi?”
„Elverŝu vian koron, nun, senhonte,
la vortoj sekvos kiel akv' subponte;
atentu, vian karakteron bridi”
„Al vi mi ne promesas kion mi ne
ja povas, la morgaŭ' ne donas certon,
sed en Kristnasko, mi, plikorinklina
ol nun, mi venos, havas mi jam sperton
pri la longvojaĝoj, mi alvenos fine
laca sed vi min kisas per am-lerito”

mi volas plori

Mi volas plori, kiel nur infano
kapablas, ke la larmpoj al singultoj
sinsekvu, ke amikaj la rezultoj
estu, sed male, ĉion batas mano
de lu, kiu havas Povon, pano
de l' egoismo homa, nur insultoj
al kiuj ja laboras por malmultoj;
plorantis ade mi, sen akompano.
Pro tio volus mi nur vin brakumi,
kaj senti vian haŭton sur la mia,
vian elspiron eliranta el la
buŝeto via, tiel suna, bela
diina, plena je amemo, pia...
ĉu, laŭ l' ver', sukcesis mi resumi?

LA KULTURO DE ESPERANTO

ILEI-konferenco, Kaunas, Litovio,
4 Aŭgusto 2005 (reviziita kaj iom pligrandigita por INTERNACIA PEDOGOGIA REVUO,
kie ĝi aperis en numero 05/4 [jarkolekto 35], paĝoj 3–6).
Aperas ĉi tie kun la afabla permeso de la aŭtoro.

Ĉu Esperanto havas kulturon? Se jes, kio estas ĝia karaktero? Kiuj estas ĝiaj eroj?

Kelkaj homoj, aparte tiuj kiuj kontraŭas Esperanton, insistas ke Esperanto ne havas kulturon. Tial ĝi ne estas vera lingvo kiel la naciaj lingvoj. Ŝajne tiuj homoj ne povas kompreni ke oni povas havi kulturon kiu ne estas nacia kulturo. Ili pravas ke Esperanto ne havas nacian kulturon, sed tio ne signifas ke Esperanto ne havas ian kulturon. Esperanto ja havas kulturon, sed ĝi estas internacia aŭ tutmonda kulturo.

Oni devas konstati ke ĉe Esperanto la rilato inter la lingvo kaj la komunumo estas inversa al la kutima situacio. Kutime la membroj de komunumo loĝas kune en unu loko, kaj la uzo de ĝia lingvo estas unue nur buŝa. La skribita lingvo ekekestas nur multe pli malfrue aŭ en kelkaj kazoj neniam. Male Esperanto unue estas skribita lingvo, kaj oni uzas ĝin en diversaj lokoj kiuj eble ne estas tre proksimaj unu al la alia. Ĉe Esperanto la skribata lingvo naskas la buŝan lingvon! Iom post iom tiuj kiuj uzas Esperanton formas ne-en-unu-lokan

komunumon kaj komencas konstrui ankaŭ novan specon de nenacia kulturo.

En kio konsistas la karaktero de la kulturo de Esperanto? Kiel jam dirite, ĝi ne estas nacia kulturo, sed Esperanto havas internacian aŭ tutmondan kulturon. Sekve ĝi devos antaŭenigi internacian kompreniĝon kaj toleron al malsamaj vivmanieroj. Esperantistoj devas respekti la kutimojn kaj lingvojn de ĉiuj grupoj tra la tuta mondo.

La diversaj naciaj kulturoj devos esti konservataj ankaŭ en tempo, kiam nova tuttera, vastanima kulturo estos konstruata kun novaj, specialaj terglobaj sentoj, kaj samtempe sen limigo de aliroj kaj perceptadmanieroj.

Malsimile al la situacio ĉe multaj naciaj kulturoj, la adeptoj de Esperanto havas nek malsaman specon de konstumoj, per kiuj vestus sin nur Esperantistoj, kiujn nur Esperantistj surhavas, nek unikan specon de nutraĵoj, kiuj estas konataj kiel nutraĵoj tipaj de esperantistoj. Male, ĉe Esperanto grava parto de la kulturo efektive estas la ekzisto de multaj

diversaj specoj de vestoj kaj multaj diversaj specoj de nutraĵo el la diversaj mondopartoj.

Alia malsama aspekto de la kulturo de Esperanto estas la tendenco rigardi al la estonteco pli ol la pasinteco. Kompreneble, ĉiu kulturo devas atenti sian historion, sed ĉe la Esperanto-komunumo, male al la kutima situacio por naciaj komunumoj, la esperoj por la estonteco estas multe pli gravaj ol la memoroj de pasintaj eventoj.

Nia respektita Zamenhof, la fondinto de Esperanto, ja nomis sin Doktoro Esperanto, kaj ankaŭ liaj sekvanĵoj estas esperantoj.

Ankoraŭ alia aspekto de la kulturo de Esperanto estas la preteco uzi novajn teknikojn por vojaĝi kaj komuniki. Ĉar la koncerna komunumo ne plu estas en unu loko sed ekzistas tra la tuta planedo, membroj de tia komunumo devas uzi la plej modernajn manierojn veturi kaj sendi informon unuj al la aliaj.

Ĉar la Esperanto-komunumo estas internacia kaj tuttera, ĝiaj membroj ankaŭ volas kunlabori kun internaciaj kulturaj organizaĵoj kiel UNESKO kaj kun diversaj internaciaj ne-registaraj organizaĵoj, inkluzive internaciajn religiajn organizaĵojn. Kompreneble ankaŭ naciaj kaj landaj komunumoj ofte volus fari tion, sed ne ĉiam. Ĉe la Esperanto-komunumo tia kunlaboro estas ĉefa celo, ne nur sekundara au hazarda afero.

Simile al la naciaj kulturoj, Esperanto havas sian literaturon. Ekzistas ne nur multaj tradukoj el gravaj

verkoj de diversaj naciaj kulturoj sed ankaŭ originalaj verkoj de diversaj specoj. Kelkaj el la pli konataj aŭtoroj estas **L. L. Zamenhof** el Pollando (la iniciinto de la lingvo), **Kálmán Kolcsay** kaj **Julio Baghy** el Hungario, **William Auld** kaj **Marjorie Boulton** el Britio, **Gaston Waringhein** kaj **Raymond Schwartz** el Francio, **Baldur Ragnarsson** el Islando, **Ueyama Masao** el Japanio, kaj **S. J. Zee** el Ĉinio. (Pardonu min ke mi ne menciis multajn aliajn, sed oni devas ĉesi ie).

Efektive, ĉar Esperanto dependas tiom de sia skribita formo, la kvanto de la skribita materialo en Esperanto ofte estas granda surprizo al ne-Esperantistoj. Feliĉe, ni havas niajn specialajn bibliotekojn, kiuj kolektas tiujn materialojn, kaj niajn vendistojn, kiuj estas pretaj vendi la novan literaturon. Oni povas konatiĝi kun la kulturo de Esperanto ne nur en libroj kaj amaso de magazinoj sed ankaŭ en kantoj kaj teatraĵoj kaj per la interreto, videobendoj, kompakt-diskoj, kaj elsendoj de radio- kaj televid-stacioj en multaj landoj kiel Pollando, Ĉinio, Aŭstrio, Italio, Brazilo, kaj Koreio.

Krom la diversaj haveblaj skribitaj materialoj, estas kelkaj aspektoj de la lingvo mem kiuj kontribuas al la kulturo de Esperanto. Ekzemple, la uzo de afiksoj permesas la kreon de novaj vortoj, eĉ pere de infanoj. La prefikso „mal” indikas la kontraŭon de la sekva radiko, kaj la vorto „trinkas” signifas ke oni prenas likvidon en la korpon. Tial oni povas uzi la tute novan vorton „maltrinki” anstataŭ uzi la pli kleran vorton „urini.” Efektive,

tiu nova vorto nun estas pli ofte uzata, aparte de la infanoj.

Per la uzo de la afiksoj ĉiu ajn povas krei novajn vortojn, kiujn aliaj Esperantistoj tuj povas kompreni. Foje unu el miaj studentoj, dum ekzameno, ne povis memori la vorton „forte” rilate al la verbo „neĝis”. Li lerte kreis novan esprimon „neĝis maldolĉe”. Tio estas tuj komprenebla esprimo kaj iom eĉ poeta, ĉu ne? Ĉu komencantoj povas simile krei novajn bonajn vortojn en aliaj lingvoj? Mi dubas pri tio. Alia ekzemplo de la uzo de la afiksoj, kiun oni ne ofte trovas en aliaj lingvoj, estas la ebleco krei vortojn el akronimoj kiel „LEI-anoj” kaj „SAT-anoj”.

La kulturo de Esperanto enhavas specialajn simbolojn, ornamojn, kaj agadojn, kiel la verdan stelon, la verdan flagon kun la stelo, la Pasportan Servon, la himnon „La Espero”, la jarajn Universalajn Kongresojn, kaj krome multajn aliajn internaciajn kunvenojn tra la tuta mondo kie ĉiuj havas ŝancon uzi Esperanton. Alia parto de la kulturo de Esperanto estas la ekzisto de kelkaj vortoj, kies signifo estas tuta mistero al ne-Esperantistoj, verboj kiel „krokodilas” kaj „kabeis”, kiujn oni ne povas simple traduki en aliajn lingvojn. Mia opinio ĉi tiuj trajtoj kune kun la literaturo kaj aliaj intelektaj kaj artaj materialoj pravas, ke Esperanto ja havas kulturon eĉ se tio ne estas nacia kulturo.

Iom post iom la Esperanto-komunumo ekevoluigas eĉ specialajn gestojn! Ekzemple nun ekekestas gesto, kiun oni povas uzi por indi-

ki „ĝis la revido!” Antaŭ kelkaj jaroj ĝi komenciĝis en San-Francisko je la fino de la Nord-Amerika Somera Kursaro. Kelkaj studentoj, kiuj venis al Usono el aliaj landoj, jam estis en la aŭtobuso por foriri al la flughaveno. Ekirironte ili metis la manojn super la kapon por formi chapelon similan al la chapelo super la litero „ĝ” en la esprimo „ĝis la revido”. Tiuj kiuj spektis ilin tra la fenestroj de aŭtobuso tuj kaptis la signifon de tiu gesto kaj faris la saman. Ŝajnas, ke tiel eble ekekestis nova adiaŭa gesto tute unika al la kulturo de Esperanto.

En Septembro 1992 **Claude Piron** verkis sespaĝan leteron en la angla lingvo, en kiu li respondis al la komento en la libro EUROPE FOR EVERYBODY (EŬROPO POR ĈIUJ) ke al Esperanto mankas kulturaj radikoj. **Piron** argumentas, ke kvankam al la lingvo certe mankis kulturo kiam **Zamenhof** unue iniciatis ĝin, tio ne plu estas la situacio. La nuntempa Esperanto, pro sia fleksebla karaktero, povis senprobleme sorbi influojn de diversaj naciaj kulturoj, eĉ de ne-Eŭropaj landoj kiel Japanio kaj Ĉinio. Piron komentas ke „se Esperanto ankoraŭ ekzistas, tio estas ĉefe pro siaj kulturaj radikoj. Homoj, kiuj restas en la komunumo de Esperanto, faras tion pro sentoj rilate al la kulturo, ne pro la racieco de la lingvo. Ili spertas interkulturan etoson, kiun oni ne povas trovi aliloke”.

Piron tiam mencias ke la kulturo de Esperanto eĉ evoluigis du originalajn specojn de poezia formo kiuj tute ne ekzistas en aliaj kulturoj. Unu

Ĉu vi jam trovis edzon dum ĉi tiu somero?

Kutime virinoj volas edziniĝi. Ili deziras veran, solenan nupton, havi infanojn kaj plenan familion.

Bedaŭrinde viroj prokrastas tion, ĉar en edziĝo ne tuj vidas sian psiko-



↙ unikan formon uzitan de **Johán Valano** (tio estas, **Claude Piron**) en la libro MALMALICE [eldonita de Literatura Foiro, Kuopio kaj Pisa, 1977] usona Profesoro **Pierre Ullman** [en anglalingva artikolo „Schizoschematic Rhyme in Esperanto” en Papers on Language and Literature, 1980] nomas „schizoschematic rhyme” („skizoarangĝa rimo”). En tiu formo la rimoj estas ne inter la lastaj vortoj en diversaj linioj sed nur inter la lastaj radikoj en la diversaj linioj, radikoj kiuj estas sekvitaj de malsamaj finaĵoj. Tia poezia formo tute ne povas ekzisti en aliaj lingvoj ĉar ĝi dependas de la unika sistemo de radikoj kaj sufiksoj en Esperanto. Kiel iu ajn povas diri, ke Esperanto ne havas kulturon kiam ĝi eĉ havas siajn proprajn unikajn poeziajn formojn? En tiu bonega letero verkita en 1992 **Piron** konkludas, ke tiuj „lingvaj spertuloj,” kiuj opinias ke Esperanto ne havas kulturon, simple ne konscias pri la faktoj. ✨

logian kaj socian intereson.

La 22-jara junulino jam scias, ke bone estus edziniĝi, la 25-jara junulo ne estas certa, ĉu por li ĝenerale estas profite edziĝi. „Mi ne devas aĉeti bierfarejon por eltrinki bieron”.

Tial virinoj devas bone pripensi por trovi ĝustan kandidaton.

Forstreku virojn neeblajn.

Ne investu viajn sentojn en virojn jam edziĝintajn, eĉ se ili ĵuras, ke ilia edzeco daŭras nur sur papero. Tamen ili ne divorcas pro: 1) infanoj, 2) malsano de sia edzino, 3) posedaĵo, 4) homeca deco, 5) religio, 6) trankvila maljuneco de panjo, aŭ bopanjjo.

Memoru, ke vi deziras geedzecon, ne amromanon kaj rapide forkuru. Edziĝintaj viroj estas specife ĉarmaj kaj antaŭ ol vi orientiĝos, vi estos duonon de via vivo suferanta „la tria”, kiu ne povas foriri. Eĉ se la amanto divorcos, certe ne por vi, sed por alia sprita fraŭlino, kiu decide postulos nupton.

Evitu konsumintojn de multaj amligoj, precipe se ili havas pli ol du infanojn kun diversaj virinoj.

Evitu ankaŭ tiujn, kiuj neniam estis en amligo havante 40 jarojn. Tio pli, se en ilia vivo gvidantino estas sola panjo. Ne iluziĝu, se aliaj virinoj ne revenigis ilin al socio, ankaŭ vi ne havos ŝancon. ↘

La Paradizo

„La Paradizo”, loko en Bory Tucholskie, la loko amikeca kaj vizitinda por esperantistoj.

La 20an de junio 2006 geesperantistoj el Pelplin kaj Malbork kaptis la inviton de **Jola Baĝorska** el Tuchola kaj vizitis ĉarman lokon „Paradizo”.

Jam la Esperanto-nomo de ĉi tiu loko tre ekinteresiĝis esperantistojn. Tamen kelkhora restado ĉi tie kon-

vinkigis nin, ke oni ankaŭ devas rekomendi ĝin al aliaj en Esperantio

„La Paradizo” troviĝas en vilaĝo Wymysłowo (4 km de Tuchola, direkte al vilaĝo Tleń).

Estas ĉi tie bele aranĝita turisma komplekso; restoracio, hotelo, agroturisma bieno, ĉevalaro, ebleco rajdi, veturi per originala kaleŝo, renkonti kun strutoj kaj aliaj ekzotikaj birdoj, ↵



↵ Evitu elsortimentitajn ekzemplerojn do: drinkulojn, narkotikulojn („li ĉesos tion post la nupto”), maldelikatulojn („li estas vireca”), avarulojn („li gardos komunan monon”), idiotojn („ĉe mi li progresos”), kaj sekse malvarmajn („li estas iom malkuraĝa”).

Via celo estas edzo, ne ruinigo de via vivo.

La imago pri la revata viro obstine daŭras en nia menso. Kiam vi ne rezignos pri ĝi estas eblaj du variantoj.

La tutan vivon vi revos pri iu nereala objekto, aŭ ŝajnos al vi, ke vi trovas ĝin.

Tiam okazos problemoj. Okazos, ke tiu sentema ulo, kiel amanta patro estas hipohondriulo kaj tiu „vireca” estas ne nur por vi, tiu romantika, simila al iama adorata filma amanto ne povas ripari necesujon — „kiu kuraĝus peti tion?”

Viro, nia venonta edzo ne de-

vas esti ideala. Ni volas edzon, ne eksponaĵon en salono.

Krom tio ankaŭ ni ne estas idealaj.

Memoru — nia imaginata idealo ne ekzistas en realeco. Kiam tiel ŝajnas al ni poste la viro okazos:

edziĝinta alkoholulo, aŭ kaŝanta samseksulo — bona kiel amiko, sed sen kvalitoj kiel edzo.

La serĉado de edzo estas arto de saĝaj kompromisoj inter revo kaj atingebla realeco, inter deziro kaj timo, inter amo kaj prudento, inter du homoj de diversaj seksoj.

Ĉu vi ne trovis lin en ĉi tiu somero? Nenio estas perdita. Antaŭ vi estas la nova jaro. Certe vi sukcesos. Fine viroj kaj virinoj estas kreitaj por vivi kune, nur la virinoj komprenas tion iom pli frue.

Zofia Milska Wrzosińska — psikologo, psikoterapeŭto

La artikolo el „Altaj kalkanumoj”
tradukis: Danuta Kowalska

ripozi kaj ĝui sporton, bongusta manĝado je favora prezo.

Granda allogo krome estas „La Muzeo de Indianoj de Norda Ameriko” fondita de fama Indiano **SAT-OKH**.

Tra la muzeo gvidas mem posedanto **Johano Kłodziński** (granda amiko de **Sat-Okh**). Lia rakonto mirigas kaj ravitas. La familio de gesinjoroj **Kłodziński** apogas Esperanton kaj havas kontakton kun internacia lingvo, ĉar la bofrato de la posedanto **Henriko Zygowski** estas multjara esperantisto kiu inspiras la familion al Esperanto.

La nomo „paradizo” estas komenco, sed Johano jam planas donadi al la novnaskitaj ĉevalidoj Esperanto-nomoj.

Interesitaj pri la traduko al Esperanto kaj por ripozi en tiu pitoreska loko vidu en la TTT-ejo: www.agroturyzm.las.pl/tuchola/klodzincy, kaj kontaktu pere de retroŝto: paradizo@las.pl kompreneble Esperante. En ĉi tiu loko ni pasis kelkajn horojn. Pli frue ni vizitis la urbon Tuchola kun belegaj, mezepokaj stratoj, vidindaĵoj kaj muzeo. Nia naŭpersona buseto kun okulfrapa ŝildo „Esperanto en Malbork” sur belega kolora foto de la Teutona Kastelo en Malbork ekinteresiĝis loĝantoj kaj vizitantoj la muzeon gelernantojn. Do ni rapie informis ilin pri Esperanto... En ĉiu loko ni lasis Esperantajn spurojn, enskribojn en la memorlibroj kaj Esperantajn informilojn.

Sekvanta celo de nia ekskurso estis vilaĝo Fojutowo (23 km de Tu-

chola, direkten al Czersk). Ĉi tie mi admiris akvedukton konstruitan en la 1847 (ĝi estas parto de la Granda Kanalo de la rivero Brda).

Poste, en vilaĝo Odry (10 km norden de Czersk) en protektita tereno nomata „Kamienne Kęgi” ni rigardis la plej grandan kromleĥon en Pollando, iama setlejo de gotoj kaj tombejo kun multaj tumuloj.

Antaŭlasta nia haltejo estis vilaĝo Orlik apud Lubnia (1,5 km de kromleĥo en Odry), loĝloko de esperantisto **Antonio Cybulski**. Dum unuhora babilado, ni gustumis „EU-lakton”. La najbaroj de Antonio kiuj ĉeestis la renkontiĝon ne konas Esperanton, sed ili diris, ke nia lingvo estas belsona — do, granda valoro de Esperanto, ĉu ne?

Jam vespere, survoje hejmen ni vizitis nian komunan amikinin, esperantistinon **Danuta Tudaj**, la ununura en Pollando esperantistino kiu posedas mezepokan kastelon, kaj kiu do regas en la Teŭtona Kastelo el 13/14 jc. Ĝi troviĝas en la vilaĝo Zamek Kiszewski, apud loko Stara Kiszewa. La kastelon Danuta kun edzo nun rekonstruas.

Nia ekskurso daŭris nur unu tago, tamen ni estis tre kontentaj. Krom belaj travivaĵoj ni havas kelkajn konkludojn.

Unuan, ke tiajn, belajn lokojn oni devas montradi al esperantistoj vizitantoj Pollandon.

La duan, ke esperantistoj estas tre amikecaj. Trian, ke oni devas multe strebi, por ke aliaj homoj eksciuj pri Esperanto, kaj ne plu prononcu:

Eksperto.

Kvaran, plej gravan por ni, ke oni devas peti geinstruistojn, ke kadre de patriotisma edukado (oni ne devas krei novan fakon), ili informu gelnantojn pri la granda invento de pola kulturo: pri ESPERANTO.

**Esperantistoj
el Pelplin kaj Malbork**



Medalo de Toleremo

Kapitulo de la Fondaĵo de **Ludoviko Zamenhof** atribuis „Medalon de Toleremo” al prof. **Władysław Bartoszewski**, pola eksministro por eksterlandaj aferoj kaj elstara pledanto por internacia dialogo kaj kunlaboro precipe inter poloj, judoj kaj germanoj. Enamanigo de la medalo okazis la 9an de junio 2006 en aŭlo de Supera Lernejo de Publika Administraĵo en Bjalistoko.

La unuan Medalon de Toleremo ricevis antaŭ 7 jaroj Papo **Johano Paŭlo la Dua** dum ekumena diservo en Drohiczyn pro lia malfermo por diversaj konfesioj, religioj ankaŭ ne-



kristanaj.

La profesoro esprimis ĝojon pro tio kaj diris, ke inter multaj ricevitaj distingiloj ĉi tiu en sia nomo havas vorton „toleremo” kaj ĝi agnoskas ankaŭ lian strebon rilate al repaciĝo inter homoj de aliaj nacioj, konfesioj kaj politikaj opcioj.

Dum dutaga restado en Bjalistoko prof. **Bartoszewski** faris du prelegojn. Unuan en **Giedroyć**–Biblioteko de la Universitato en Bjalistoko, st. „Valoras esti deca”, kaj duan en Supera Lernejo de Publika Administraĵo, sub titolo „Teorio kaj praktiko en la eksterlanda politiko”. La prelegojn aŭskultis multe da gastoj kaj studentoj de la menciitaj altlernejoj. Post la prelegoj la profesoro subskribadis sian libron „Valoras esti deca”. Okazis ankaŭ solena meto de floroj sub la Monumento de **Zamenhof** en Bjalistoko.

La profesoro kaj lia edzino havas belegan bonhumoron. Dum komuna vespermanĝo kun geesperantistoj ili rakontis pri aliaj travivaĵoj ligitaj kun diplomacio.

La bela preparo de ceremonio atestas grandan laboron de bjalistokaj geesperantistoj en popularigo de Esperanto. Post fino de ĉiuj ceremo-

nioj ili disdonadis multajn informilojn pri Esperanto inter gestudentoj.

Precipan atenton meritas granda gastemeco de bjalistokaj samideanoj. La kroma restadprogramo speciale planita al ni, loĝado, gustumado de la frandaĵoj, vizitado de la urbo kun multaj ZEOj, komuna E-kantado kaj babilado kaj precipe bonkoreco konvinkis pomeriajn esperantistojn, ke Esperanto estas ne nur lingvo, sed ankaŭ granda amikeco. Koran dankon al Vi!

Jadwiga Wasiuk



La „Ŝtono de Romaoj” en „Parko de la Mondo”

La 12an de aŭgusto 2006 jam la 33an fojon renkontiĝis polaj kaj eksterlandaj esperantistoj por partopreni la ceremonion nun pro plantado de la romaa pino kaj malkovro de la „ŜTONO de ROMAOJ”.

La ceremonion preparis la E-rondo „Kastelo” el Malborko kaj „Arba Ŝelo” el Rokitki (antaŭurbo de Tczew) kun la helpo de esperantistoj el la „Verda Stelo” en Pelpino i.a. de



la junulara ensemblo „KVAROPE”. Alvenis multe da gastoj kaj aŭtoritatoj de la du urboj, nome reprezentanto de la Prezidento de Tczew kaj Starosto kaj Vic-starosto de la Distrikto Malborko kaj konsilanto de la Urba Konsilantaro de Malborko.

La malkovron de la ŝtono faris du romaoj el Olŝtino — **Zdzisław Fedorowicz**, la altrangulo de la Romaa Societo, **Adamo „LULEK” Fedorowicz**, estro de la folklor-ensemblo „HITANO” kaj granda amiko de romaoj — la sciencisto de Varsovia Politekniko dro **Mario Zajac**.

Post la oficiala parto okazis koncerto sur la estrado (apud la muroj de la Teŭtona Kastelo) de romaa ensemblo „Hitano” kaj de la junulara E-ensemblo „Kvarope” el Pelpino kaj ankaŭ komuna kantado en la pola, la romaa kaj Esperanta lingvoj. La ceremonion ornamis spektaklo de fajroj kaj montrado de la bataloj fare de mezepokaj kavaliroj el la malborka kastelo. Aperis pri tiu evento kelkaj artikoloj en la gazetoj de Malborko kaj Tczew kaj en la TTT-ejoj de la gazetoj estis la samaj artikoloj, sed krome kun la apogaj por Esperanto komentarioj fare de malborkanoj kaj de esperantistoj el Varsovio, Gdynia, Silezio kaj Nowy Sącz.



Universala Kongreso

Kara Paweł, karaj Polaj Esperantistoj, dankon pro la subteno de mia ideo kongresi en 2009 en Bjalistoko. Fakte la 6an/7an de julio vizitosis min la Ĝenerala Direktoro de UEA

— **Osmo Buller** por rigardi la proponatajn kongresobjektojn kaj rekonti kelkajn oficialulojn de la urbo kaj de la regiono.

Mi konscias, ke mia urbo ankoraŭ ne estas plene preta gastigi la kongreson, nek ke ni sen helpo de polaj kaj pollandaj (kiel **Ilona Koutny**) aktivaj esperatistoj sukcesos memstare okazigi la Universalan Kongreson, sed ekzistas ŝanco fari tion (kongresejo kaj flughaveno survojas) do mi esperas, ke ni povos kunorganizi la kongreson okaze de la 150a naskiĝdatreveno de Ludoviko en lia naskiĝurbo.

Se ne en Bjalistoko, tiam estus tre bone, sciante la „fortojn” de Poznań, i.a.: organizajn tradiciojn de Arkones kaj Esperantologiaj Studoj kaj bonajn alvenoblecojn, mi forte subtenas tiun ideon.

La ideo kunsidi okaze de la ĉijara ARKONES estas laŭ mi tre bona kaj mi tre dankas al Paweł pro tiu iniciato.

Amike salutas ĉiujn,

Jarek Parzyszek



Tio ankoraŭ ĝis nun na okazis!

La Esperanta flago flirtanta super procesio kaj la grupo de Esperantistoj, kiuj portas vokvorton „ESPERANTO AMIKIGAS”. Tio okazas ĉe la preĝejo, inter la homoj, kiuj probable la unuan fojon ekaŭdas pri Esperanto dum saluto kaj beno de pastro paroĥestro, ankaŭ Esperantisto — **Stanislavo Pietrzak**.

Ĝi okazis la 15an de junio 2006, en la tago de Dia Korpo, kiun en la scenaro de lago situata inter montetoj kaj la romanika sanktejo alkroĉita al roka bordo, inter kampoj de maturanta greno kaj florantaj herbejoj. Tio estis io escepta kortuŝanta koron kaj por ĉiam restanta en memoro.

Jen en la loko Tropie, ĉe Ĉova lago, aŭtokara grupo de Esperantistoj, studentoj de Universitato de la Tria Aĝo en Nowy Sącz, festis la finitan duagradan kurson de la lingvo Esperanto. Kelkajn tagojn pli frue la 10an de junio 2006 en Łazy Biegonickie ĉe Stary Sącz okazis la ekzameno por tiuj studentoj, kiuj deziris ricevi atestilon.

La regularo de Unuversitatoj de la Tria Aĝo ne permesas organizi devigajn ekzamenojn pri iu ajn fako. Tial nia ekzameno estis organizata pro la volo de la studentoj.

Dum la ekzameno ĉeestis Prezidanto kaj Sekretario de PZE sinjoroj **Stanislavo Mandrak** kaj **Aleksandro Zdechlik**. Ekzameniĝis duono de kursanoj, 28 personoj. La ekzameno estis libera konversacio dum amika kunveno en la hejmo de la familio **Komar**. Pluvo malebligis planotan kunvenon en ĝardeno. Per agrablaj vortoj la gastoj el PZE kaj kol. **Elżbieta Pachon** reprezentanta Estraron de SUTW gratulis al ni kreadon de la forta, aktiva kaj amika grupo de novaj Esperantistoj. Oni akcentis meritojn de niaj instruantinoj, kiuj dediĉis sian tempon dum sep monatoj gvidante kursojn dufoje en semajno po du horoj:

Danuta Kowalska, kiu preparis la kurson laŭ Cseh–metodo kaj tekstojn por du grupoj, **Jolanta Kieres**, kiu la unuan fojon gvidis la kurson laŭ tiu metodo kun sukceso kaj komencis lecionojn kun nova grupo en la tria tago de semajno. La kvaran grupon instruis kol. **Stanisława Krzywdzińska** laŭ tradicia metodo.

La okazintaĵo estis priskribata de redaktorino **Monika Kowalczyk** en *Pola Gazeto* kun granda foto kaj eldona la 13an de junio 2006.

Oni solene festis la laboron de multaj monatoj per vojaĝo al ermitejo de sanktaj soluloj Sverado kaj Benedikto en Tropie. Invitis nin paroĥestro, nia amiko Esperantisto. La kunveno havis karakteron religian, edukan kaj ripozan: religian — per ĉeesto en diservo de Dia Korpo, procesio inter herbejoj, preĝo kun meditado en naturo; edukan — resumo de la kurso kaj enmanigo de atestiloj pri partumo en ĝi, ekkono de historio de unu el la plej malnovaj antikvaj sakraj objektoj en Pollando, prelego de la pastro paroĥestro pri Esperanto en romkatolika eklezio, grupaj preĝoj kaj kantoj en Esperanto, interesajoj pri la regiono rakonta-



taj de gvidantinoj volontulinoj, Esperantistinoj **Vladislava Gluc** kaj **Ana Toton**; ripozan — ripozo ĉe la lago, tagmanĝo sur teraso de Pilgrima Domo, la plado kuirita de mastrino, kiu ricevis la unuan premion en konkurso pri regionaj pladoj dum Poznana Foiro POLAGRA 2005, integrado de la Esperanta grupo.

Etoson de la okazintaĵo montras la aldonitaj fotoj pri la gajaj, feliĉaj homoj sen ĝeno manifestantaj sian engaĝiĝon pri Esperanto, portantaj niajn simbolojn en neesperantista medio.

Ni proponas al ĉiuj agantoj organizi similajn kunvenojn, ekster la esperantista medio, por montri nian ekziston, interesigi „aliulojn” pri Esperanto.

Ni estu la gutoj borantaj ŝtonon!

Halina Komar



35 jaroj de ĝemela kunlaboro inter la Esperanto–Societoj Neubrandenburg (Germanio) kaj Koszalin (Pollando)

La 24an de junio 2006 kunvenis 25 geamikoj el Pollando, Nederlando kaj

Germanio por festi la 35-jaran kontinuan partneran kunlaboron inter la urboj Neubrandenburg (siatempe GDR) kaj Koszalin. Tiu kunlaborado okazis silente sed tre efike, ni ĉiujare reciproke akceptis delegaciojn, kiuj ne nur partoprenis la aranĝojn, sed aktive kontribuis al la programoj: ekzemple Zamenhof-festo, Ĉebalta Esperanto-Printempo, Somera Esperanto Familia Tendaro, Semajnfinaj E-Seminarioj, Landa Esperanto Kunveno, Pomeria Esperanto Renkonto, ktp. Dum jaroj kreskis ankaŭ multaj individuaj, amikecaj rilatoj. Nia kunlaboro ankaŭ kontinuus dum la militstato en Pollando aŭ dum la revolucio en 1989/1990.

Dum nia kunveno ni ankaŭ inaŭguris la „Esperanto-Padon” tra la urbo Neubrandenburg, kies ĉefaj stacioj estas: Militkaptitejo por polaj oficiroj (OffLag II) en Neubrandenburg, kie la pola ĉefleŭtnanto **Jan Popławski** el Poznano gvidis (1941/1942) sekretan E-grupon. En la jaroj 1971 kaj 1972, je invito de la E-Societo Neubrandenburg, **Jan Popławski** vizitis nian urbon kaj la regionon. Je tiu memorejo ni silentis kaj metis florojn.



(Fotis Cz. Baranowski)

Alia stacio estas la Esperanto-kverko en la Eŭropo-Parko, tie polaj kaj germanaj geamikoj plantis tiun arbon antaŭ du jaroj je la 81a Germana Esperanto-Kongreso.

Kore, via

Verner Fenig (Werner Pfennig)
estro de landa asocio
Meklenburgio-Antaupomerio
www.esperanto-nb.de



(Post)kongresaj informoj

59 IKUE Kongreso

Preskaŭ 120 personoj el 10 landoj elektis por ĉijaran IKUE kongreson (8–15.07.2006) belegan urbeton de Ĉeĥa Moravio — Velehrad. Ĝi estas konata kiel grava spirita centro, loko de oftaj ekleziaj pilgrimoj. En urbe-to vivas nur 1400 loĝantoj. Solenan malfermon partoprenis ĉefepiskopo de Olomouc mons. **Jan Graubner**. Li estas Prezidanto de Ĉeĥa Episkopa Konferenco. Solena sankta meso estis celbrita en Esperanto, kvankam ĉefepiskopo deklaras, ke ne estas esperantisto. Krom diversaj religiaj prelegoj, diskutoj pri bibliaj temoj, pri miraklo de Eŭkaristio, aŭskultado de poemoj, koncertoj, organizantoj proponis konatiĝon kun lokaj vidindaĵoj speciale kun loka baziliko al Ĉielpreno de Virgulino Maria. Kongresanoj vizitis ankaŭ pitoreskan regionon Valtice–Lednice situantan apud ĉeĥa–aŭstria landlimo kun kastelo konstruita en romanti-ka stilo, kun vasta parko kaj paroĥa

preĝejo, unu el la plej grandaj en la diocezo de Brno. Tre interesaj estis vesperaj programoj kaj meciinda estis la adiaŭa vespero. Reprezentaĵoj de la landoj prezentis interesajn programojn ligitajn kun propra kulturo. Solenan ferman sanktan meson celebris Ĉefepiskopo de Hradec Kralove — mons. **Karel Otčinašek**. Same kiel malferma, ĉi sankta meso estis celebrita en Esperanto.

Tuta kongreso estis bonege preparita pere de teamo kun s-ro **Milošlav Švaček** kiel prezidanto. Loĝado kaj manĝado estis bonega. Oni devas substreki, ke dum tiuj varmegaj tagoj organizantoj zorgis pri malvarmaj trinkaĵoj perfekte, dum la tuta diurno. Sekvontjara IKUE kongreso okazos en Pelplin kadre de la 18a Esperantista Ekumena Kongreso.

Stanisław Mandrak



Informo pri Renkontiĝo en Pelplin (Pollando)

Kelkaj vortoj pri Sesa Printempa Esperanta Renkontiĝo en Pelplin (apud Gdansko) kaj pri la enkadra prezentado de la kvizkonkurso

Renkontiĝon ĉeestis super 100 (cent) geesperantistoj el Pollando kaj el Germanio kiuj disputis pri la historiaj eventoj de Pola Esperanto-Asocio, spektis belan prezentadon de interesaj folkloraj trupoj, vizitis belajn vidindaĵojn kaj partoprenis lokajn festenojn. Pri ĉiuj organizaj problemoj cerbumis sperta, loka esperantistino

Jadwiga Wasiuk, kiu asertis, ke ĉijara renkontiĝo certe ne estos la lasta.

En la renkontiĝa kvizkonkurso partoprenis 25 (dudek kvin) kvizemuloj. Inter kvizemuloj estis ankaŭ 6 (ses) tre junaj esperantistinoj, kiuj tamen ne sukcesis gajni premiojn. Kaj premioj estis relative riĉaj (rulvalizo, tendo, aeromatraco, kaj aliaj, ekzemple Esperanto-libroj).

Kvizkonkurso estis aranĝita en lerneja ĉambro, kie estis kviete kaj silente, do — bona etoso por kvizi.

Post kelkaj etapoj de la kvizo finfine venkis kaj unuan premion konkeris s-ro **Andrzej Kiszkiel** (PL); la duan kaj la trian lokojn kun la samaj nombroj da poentoj konkeris: s-ro **Edward Kozyra** (PL) kaj s-ro **Stanisław Śmigielski** (PL); la kvaran kaj la kvinan lokon samtempe havis s-ino **Maria Markowska** kaj s-ro **Andrzej Marszałkowski** (PL).

Gvidanto de la kvizkonkurso — **Marian Zdankowski** — deklaris ne rifuzi inviton por gvidi kvizkonkursojn ie ajn, se nur premioj por kvizanoj estos (relative) riĉaj. Samtempe li invitis partopreni kvizkonkurson, kiun li mem gvidos dum Florenca UK, kaj kie estas planataj interesaj premioj.

Marian Zdankowski



UK 2008 okazos en Roterdamo, 2009 eble en Bjalistokode

La Universala Kongreso de Esperanto en la jaro 2008, kiam UEA iĝos centjara, okazos en la ĉefurbo

de UEA, Roterdamo. Tion sciigis la ĝenerala direktoro de UEA, **Osmo Buller**, en Florenco. La freŝa decido de la estraro de UEA, farita en Florenco, ankoraŭ ne estas oficiale diskoniĝita. Ĝi tamen estis menciita dum la programero Centra Oficejo respondas marde matene. La kongreso en 2009 eventuale okazos en Bjalistoko. En la jam tradicia programero kutime ĉefe aperas teknikaj demandoj pri konteltiroj kaj publikigado de retadresoj en la kongreslibro. Same estis ankaŭ ĉi-foje, sed kiam nederlanda kongresano demandis pri famoj, laŭ kiuj la Universala Kongreso de Esperanto en la jaro 2008 povus okazi en Roterdamo, **Osmo Buller** sciigis novaĵon.

— Ni povas forgesi la finaĵon ~us tiurilate. La estraro de UEA ĵus decidis, ke en 2008, kiam UEA festos sian centjariĝon, la kongreso okazos en Roterdamo. La kongreso estos iom speciala, ĉar ĝin organizos UEA mem, ĝi ne okazos laŭ la invito de landa asocio aŭ loka klubo. Ni kompreneble faros la kongreson kunlabore kun la landa asocio, Esperanto Nederland, sed la inviton faris UEA, kiu invitis sin mem al sia propra ĉefurbo, rakontis **Osmo Buller**.

Pri postaj kongresoj ankoraŭ ne estas certaj informoj, li aldonis.

— Pri la jaro 2010 mi absolute ne povas ion diri, ĉar tiam ni devos decidi pri la sekva futbalĉampiono. Se mi dirus ion, tio malfortigus nian pozicion ĉe la internacia futbala federacio FIFA. Sed pri la jaro 2009 mi povas diri, ke septembre ĉi-jare mi iros al

Pollando por esplori kelkajn lokojn.

Pollando invitis la Universalan Kongreson por la jaro 2009 ĉar tiam plenumiĝos 150 jaroj post la naskiĝo de Ludoviko Zamenhof, kaj Bjalistoko estas unu el la kandidat-urboj. La finan decidon pri la kongresurbo 2009 faros la nova estraro de UEA, elektota en Jokohamo venontjare.

Inter la demandoj al la Centra Oficejo estis ankaŭ plendoj pri hotelaj problemoj. Pluraj kongresanoj kiuj mendis kaj pagis hotelĉambron tra UEA poste eksciis, ke por ili ne estas loko en la mendita hotelo. Anstataŭe ili devis ekloĝi en aliaj hoteloj en malpli oportuna loko, senklarige kaj sen pardonpeto, plendis iu ĉeestanto.

— Tio ne estas nia kulpo, sed mi pardonpetas. Kulpas la hoteloj kiuj akceptis tro da rezervoj. Ili atendis, ke iuj ne venos, sed tiel ricevis pli da homoj ol ĉambroj, kaj devis tiam trovi aliajn lokojn, klarigis konstanta kongresa sekretario **Clay Magalhães**.

— Ĉi tiu kongreso estis escepte malfacila pri loĝado, ĉar estis tiom da malgrandaj hoteloj. Ni mem loĝas en iu domo, en kiu estas en ĉiu etaĝo alia hotelo, iuj hoteloj havas nur kvin ĉambrojn. Feliĉe ne iĝis tiom da problemoj kiel ni timis, sed iom da problemoj, diris **Osmo Buller**.



TEJO havas novan prezidanton

Preskaŭ 300 el la 420 aliĝintoj al la ĉi-jara Internacia Junulara Kongreso

en Sarajevo efektive partoprenis la aranĝon, kiu parte okazis tute proksime al la ejo de la unua Sarajeva IJK de la jaro 1973. Kvindeko da junaj partoprenintoj de la Universala Kongreso en Florenco komune vojaĝis per buso al Sarajevo, tra Slovenio kaj Kroatio. Nova prezidanto de TEJO nun estas **David-Emil Wickström** — pro personaj kialoj demisiis **Heming Welde Thorbjørnsen**, elektita pasintjare en Zakopane. Lokaj amaskomunikiloj amplekse raportis pri la kongreso. La ĉi-jara Internacia Junulara Kongreso de TEJO estis fermita en Sarajevo dimanĉe, la 13an de aŭgusto, sed plu daŭras la diversaj postkongresaj aranĝoj.

Laŭ la kvanto de aliĝintoj (420) la ĉi-jara IJK estis klare malpli granda ol la pasintjara kongreso en Zakopane (564 aliĝintoj), sed ja pli granda ol la ceteraj IJK-oj post 1999, kiam la kongreso en Veszprém, Hungario, kolektis la mirinde rondan kvanton de 500 aliĝoj.

La ĉi-jara kongreso ankaŭ estis multe pli granda ol la unua IJK en Sarajevo, okazinta en 1973 — tiam estis 282 aliĝintoj. Ĉi-jare la Internacia Junulara Kongreso unuafoje okazis en la ĉefurbo de sendependa ŝtato, ĉar en 1973 Bosnio-Hercegovino ankorau estis parto de Jugoslavio.

En la 1990. jaroj, lige kun la disfalo de Jugoslavio, Sarajevo estis scenejo de kruelaj bataloj. Unu el la plej popularaj programeroj de la IJK en Sarajevo estis la diskutrondo pri la milito en eksa Jugoslavio, kaj multaj partoprenis ankaŭ aranĝon pri la ro-

lo de islamo en tutmondiĝo kaj multkultureco. La temo de la kongreso estis ĝuste „Multkultureco kaj tutmondiĝo”.

[...] Kiel kutime en paraj jaroj, komencis sian mandatperiodon nova komitato de TEJO. Kiel nova komitatano C estis elektita **Ilja De Coster**. Kiel ano de la financa komisiono de UEA li antaŭe forte kritikis la „konservativan kaj senperspektivan” finncan politikon de UEA.

La nova komitato de TEJO ankaŭ starigis du novajn komisionojn: unu pri informila strategio kaj la alian pri eltrovado de novaj fontoj de subvencioj por la landaj sekcioj de TEJO.

La antaŭa komitato de TEJO pasintjare elektis novan estraron por dujara mandatperiodo, sed jam nun en Sarajevo aperis neceso kompletigi la teamon. Pro personaj kialoj, ŝajne ĉefe manko de tempo, **Heming Welde Thorbjørnsen** jam antaŭ la kongreso anoncis, ke li forlasos sian postenon. En lia loko kiel nova prezidanto estis elektita **David-Emil Wikström**, doktoriĝa studento pri etnomuzikologio, kiu esploras pri rusa populara muziko en Sankt-Peterburgo.

Sian postenon forlasis ankaŭ la asisto de TEJO, **Katja Ignatieva**. En ŝia loko estis elektita **Adenjo Charrière**, kiu ankaŭ reprezentis TEJO en la kunsidoj de la komitato de UEA en Florenco.

La informila strategio de la ĉi-jara IJK evidente estis sukceso. La du ĉefaj gazetoj de Bosnio-Hercegovino („Dnevni Avaz” kaj „Oslobod-

jenje”) ĉiutage publikigis plurajn artikolojn pri la kongreso. Krome tri televidkanaloj kaj du radiostacioj havis diversajn elsendojn.

— Laŭ opinio de **David-Emil**, la nova prezidanto de TEJO, temas pri la amaskomunikile plej kovrita IJK ĝis nun, komentas LKK-ano **Samir Ribić**.



Nova estraro de ILEI

La Komitato de ILEI, en sia kunsido okazinta je 2006-06-26 en Parizo, enkadre de la 39a Konferenco de ILEI, elektis novan estraron de ILEI por la periodo 2006-2009:

— **Radojica Petrović**, Serbio (prezidanto) — **Atilio Orellana Rojas**, Nederlando/Argentino (sekretario) — **Sjoerd Bosga**, Svedio/Nederlando (kasisto) — **Aida Ĉizikaitė**, Litovio (konferencoj, scienca agado) — **Zsófia Kóródy**, Germanio/Hungario (E-centroj, instrukapablighado, ekzamenoj) — **Yas Kawamura**, Japanio (Azia agado) — **Miahai Trifoi**, Rumanio (lerneja agado).

Prizorgado de aliaj agad- kaj taskokampoj de ILEI (informado, eldonado, junulara agado, projektoj, ekstera agado...) estos ankoraŭ dividita inter la estraranoj aŭ komisita al eksterestraraj kunlaborantoj.

La Komitato dankis kaj la nova estraro dankas al la ĝisnunaj estraranoj **Stefan MacGill**, **Mauro La Torre** kaj **Hokan Lundberg** pro ilia laboro por ILEI kaj esperas daŭrigon de kunlaboro en diversaj roloj.

Radojica Petrović

Herzberg am Harz — la Esperanto-urbo!

Unika evento okazis por la Esperanto-movado: la urba konsilantaro de Herzberg en Germanio, Eŭropo (ĉiuj deputitoj de la kvar partioj kun 3 sindetenoj) voĉdonis la 11an de julio: la nova oficiala nomo de la urbo fariĝas:

Herzberg am Harz, die Esperanto-Stadt/la Esperanto-urbo!

La urbo en ĉiu kampo fiere subtenas kaj laŭ sia kapablo antaŭenigas la uzadon de Esperanto por neŭtrala internacia interkompreniĝo, kaj planas uzi la lingvon por montri al la mondo siajn homajn, turistikajn, ktp. valorojn.

Kion la urbo jam faris kaj daŭre faras por kaj en Esperanto?

— E-lingvaj urbaj vojmontriloj montras al la Esperanto-Centro

— la oficiala leterpapero de la urbo surhavas la novan nomon: Herzberg — la Esperanto-urbo

— E-o estas uzata por la ĝemel-urbaj kontaktoj: (Herzberg kaj Gora (PL) kadre de modelprojekto paralele ofertas E-on por siaj civitanoj kaj helpas la disvastigon de la lingvo por interkomunikado)

— E-arkivejo funkcias en la malnova urbodomo

— parttempa dungito de la urbo zorgas pri E-rilataj aferoj (kunorganizas programojn, disdonas E-afiŝojn, alvokojn por programoj, ktp.)

— la urbo provizas (senpage aŭ ege favorpreze) ejojn por E-kursoj, konferencoj, kunsidoj, renkontiĝoj,

koncertoj, ktp.

— en ĉiuj lernejoj de la urbo estas E-instruado (en la lernojaro 2005/2006 ĉ. 100 gelernantoj)

— Kelkaj ekzemploj, kie kaj kiel Esperanto ĉeestas en la Esperanto-urbo:

— Esperanto-Gesellschaft Südharz aktivis jam de 30 jaroj, kunligas E-istojn de la urbo kaj regiono

— Interkultura Centro Herzberg/ Germana Esperanto-Centro ofertas tutjaran programon kun lingvokursoj en ĉiuj niveloj, seminariojn, konferencojn; kaj kiel klerigejo de GEA klerigas kaj pluklerigas E-instruantojn, instruistojn

— Esperanto-biblioteko, video-kaj gazetarkivo estas tutjare vizitebla, praktike uzebila por studado, esplorado, ktp.

— ekzamenejo por Germana Esperanto-Instituto kun 2 rajtigataj



La nova emblemo de la urbo, kiu aperas sur ĉiu oficiala leterpapero.

ekzamenantoj, porokaza oferto de UEA/ILEI-ekzamenoj

— Interkulturaj vesperoj por neesperantista publiko

Kompreneble estas kaj estos multaj farenaĵoj por ke dum la venontaj monatoj kaj jaroj ni kune kreu taŭgan Esperanto-infrastrukturon kaj por la Esperanto-movado kaj por la piloturbo Herzberg.

Ni bezonas ĉies subtenon, ideojn, la amasmediojn, ktp. por bonkvalite merkatumi tiun unikan bonsxancon por Esperanto.

Viaj eventualaj gratulleteroj povus esti bona tuja subteno. Bonvolu adresi ilin al nia urbestro Gerhard Walter:

buergermeister@herzberg.de
kaj bv. sendi kopion al ni:
esperanto-zentrum@web.de
Dankon!

Peter Zilvar, Otto Kern, Zsofia Korody, Kuba Rybczynski, Marika Frense, H. Mantz, M. Reimann



Poŝtmarko kun portreto de Kálmán Kalocsay

Kálmán Kalocsay forpasis la 27an de februaro 1976. Danke al la zorgado de s-ino Ada Csiszár, okaze de la 30a datreveno de lia morto, estis produktita personigita oficiala poŝtmarko en valoro de 50 HUF.



La prepozicio SEN en praktika uzado

Tiu ĉi prepozicio estas montranta neatenditan foreston aŭ mankon de iu aŭ io: **ekz.** Kelnerino donis al mi kafon kun kremo, tamen **sen** sukero. Ŝi vivas tre modeste **sen** familio kaj **sen** vivcelo. Neniam estas regulo **sen** escepto. La generalo venis **sen** adju-tanto.

Du gelernantoj preterpasis sian instruiston **sen** saluto kaj poste unu el ili veturis per buso **sen** bileto. Ne **sen** kaŭzo ili tion faris. Nudistoj banis sin en la maro **sen** bankostumoj. Ŝi forveturis al sanatorio **sen** sia edzo. Tie iu konfesis al ŝi amon **sen** profunda pripenso. **Sen** vi (**sen** via helpo) mi ne sukcesus modernigi la komputilon. Via letero ne estas **sen** eraroj. La patro diris tion **sen** kolero. Nenia ago fariĝas **sen** pago. Ne ekzistas fumo **sen** fajro.

La prepozicio sen montras ankaŭ mankon de stato aŭ ago. Ekz.: Ne venas gloro kaj honoro **sen** bona laboro. Li restis hejme kelkajn tagojn **sen** manĝi (ne manĝante).

Rimarko: Infinitivan konstruon post **sen** Zamenhof malkonsilis, sed ankaŭ li mem uzis tian kelkfoje: **ekz.** La suno neniam leviĝas **sen** rigardi batalantojn. Kvankam la uzado de **sen** antaŭ infinitivo estas relative neofta, ĝi estas tute korekta, logika kaj utila. **Ekz.:** Ŝi forveturis **sen** diri eĉ

unu vorton (=ne dirinte eĉ unu vorton). Li foriris **sen** premi mian manon (=ne preminte mian manon).

Vortfarado kun la prepozicio sen
senigi = kaŭzi, ke io (iu) ne plu havu ion. **Ekz.:** Kaino **senigis** sian fratron je la vivo. Lia patro **senigis** sin je ĉiaj personaj privilegioj;

seniĝi = liberiĝi je io, forigi ion de si. **Ekz.:** Ŝi **seniĝis** je sia vesto;

Sen apartenas ankaŭ al prefiks-igemaj prepozicioj. Funkciante kiel prefiksoido ĝi havas diversajn signifojn. **Jen pluraj ekzemploj:**

sensignifa = havanta nenan precizan sencon aŭ valoron

senerara = ne entenanta, ne farinta eraro(j)n (senerara presaĵo)

senfina = ne havanta limon, mezuron (senfina amo, ĝojo, sopiro)

senlima = tiel vasta, granda, ke ĝi ne havas limon (La ĉiela regno estas senlima, tiel same kiel la amo de Dio)

senmorta = tia, ke ĝi neniam estos mortanta (senmorta animo)

senanima = ne havanta animon (La bestoj estas senanimaj estaĵoj)

sentauĝa = tia, ke ĝi (li, ŝi) tauĝas por nenio

senpripensa = ne havanta inklinon aŭ kutimon pripensi ion (De senpripensa rekomendo venas ploro kaj plendo)

senvalora = havanta nenan valor-

on (Tiu ĉi pentraĵo estas senvalora)

sensuna ĉielo, **senventa** vetero,
senaroma frukto, **senpaga** loĝejo

senkosta vojaĝo, **senintereza**
prunto, **senargumenta** polemiko,
senviza interŝanĝo, **senfebra** sta-
to, **sengola** rezulto

senkulpigi = aserti iun ne kulpa
(Li senkulpigis ŝin antaŭ tribunalo)

senpekigi = absolvi, purigi, liberigi
je pekoj (kutime en pekprenejo)

senvestigi = demeti unu aŭ plura-
jn partojn de ies vesto

sendolorigi = fari, ke ies organo
aŭ membro ne plu sentu doloron

senpolvigi = senigi ion je polvo
(Ŝi senpolvigis siajn ŝuojn, vestojn)

senĉese = daŭre, konstante ion
fari (Mi senĉese pensas pri vi)

sendube = certe (Venontjare mi
sendube venos al vi por kelkaj tagoj)

senkondiĉe = sen ia kondiĉo
(Li konfidas al ŝi plene kaj senkon-
diĉe)

senprokraste = tuj, senatende
(Ŝi senprokraste telefonis al sia pa-
tro)

sendorme = ne povante dormi
(Li pasigis sendorme la tutan nok-
ton)

senpartiuo = homo ne apartenan-
ta al tiu aŭ alia partio

sentalentulo = homo ne posedan-
ta naturan talenton

senlaborulo = tiu, kiu ne povas
trovi laboron

senreligiulo = ateisto, konfesanta
neniun religion

sensencaĵo = io, kio ne havas sen-
con

senordo = malordo, kaoso.

**Jen kelkaj proverboj kun la prepo-
zicio sen el la Proverbaro Esperan-
ta prilaborita de Ludoviko Zamen-
hof:**

- ❖ Sen laboro ne venas oro.
- ❖ Sen mensoga rekomendo ne iros
la vendo.
- ❖ Sen mono oni estas nulo, kun mo-
no — saĝulo.
- ❖ Sen speso unua ne ekzistas la
dua.
- ❖ Sen ordo en afero ne ekzistas pro-
spero.
- ❖ Sen fajro ne brulas eĉ pajlo.
- ❖ Sen gutoj malgrandaj maro ne ek-
zistus.
- ❖ Senfara plendo ne estas defendo.
- ❖ Senfortuloj longe vivas.
- ❖ Senlaboreco estas patrino de ĉiuj
malvirtoj.
- ❖ Senpaga estas nur la morto, sed ĝi
kostas la vivon.

*Vizitu la hejmpaĝon de la Eldo-
nejo HEJME: www.hejme.com.pl.
Krom aktualigata enhavo, rilatanta
la eldonan agadon, vi povas trovi
tie ankaŭ materialojn ne publikigi-
tajn en Pola Esperantisto kaj men-
di librojn (por poloj aldoniĝis spe-
ciala mendilo kun prezoj en PLN).*

*Kontribuantoj al la preparata
„Pola Antologio” trovos ankaŭ tie
necesajn informojn pri kunlaboro.*

*Por la pagantoj: ĉiam kun via pa-
go (ekz. por libroj) al la banka
konto informu pri la pago perpoŝte
(prefere retpoŝte: hejme@hejme.com.pl).
Antaŭdankon!*

Josef Shemer (Israelo)

Judaj anekdotoj kaj ŝercoj

22. En iu orienteŭropa juda vilaĝo mankis junaj homoj liberaj al geedziĝo kaj oni devis importi ilin el aliaj vilaĝoj.

Unufoje edziĝonto estis atendota sed pro eraro du estontaj bopatrinoj iris al la trajna stacidomo por ricevi lin. Ambaŭ argumentis ke la ĵus alveninta junulo apartenas al ŝia filino, kaj fine la afero atingis la tribunalon.

Kiam la juĝisto aŭdis pri kio temas li diris: „Ni tuj solvu la problemon laŭ la metodo de la biblia reĝo Salomomo: Prenu tranĉilon kaj distranĉu la junulon. Ĉiu el vi ricevos ĝuste duonon de li”.

La unua virino diris: „Bonvolu konservi lin. Mi preferas cedi”.

Sed la alia diris: „Bonege, distranĉu lin tuj!”

Aŭdinte tion-ĉi la juĝisto diris: „Redonu la junulon al la dua virino. **Ŝi estas la vera bopatrino!”**

23. Sinjorino Ben-Baruĥ, al sia gastino: „La familio de mia edzo devenas de la reĝo Davido. Kie komenciĝas la genealogia arbo de via familio?”

Gastino: „Tio ne estas klara ĉar la donitaĵoj de mia familio perdiĝis en la Diluvo”.

24. Juda rabeno kaj katolika pastro veturas trajne en la sama kupeo. Subite diras la pastro: „S-ro rabeno. Mi scias ke via religio ne permesas al vi manĝi porkaĵon. Sed ĉu vi vere neniam gustumis tion, almenaŭ unu fojon?”

Respondas la rabeno: „Mi diras al vi la veron, kolego. Unu fojon, antaŭ multaj jaroj, mi gustumetis porkaĵon”.

Pasas 10 minutoj. Subite la rabeno demandas la pastron: „S-ro pastro. Mi scias ke via religio ne permesas al vi edziĝi. Sed ĉu vi vere neniam provis esti kune kun...?”

La pastro interrompas lin: „Jes, mi scias kion vi volas demandi. Mia respondo estas jesa: unu-du fojojn mi pasigis tempon kun virino”.

Post 5 minutoj diras la rabeno al sia najbaro: „Nun konfesu: ĉu tio ne estis pli bona ol porkaĵo?”

Kontinuota